

马尔库什-加博尔 博士

东南亚之旅

ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO

Dr. Márkus Gábor: DONG NAN YA ZHI LÜ

ISBN 978-963-08-5552-5

Ĉiuj rajtoj rezervitaj!

© Dr. Márkus Gábor, 2013

Eldonejo:



**MAGYARORSZÁGI ESZPERANTÓ
SZÖVETSÉG**
HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO

1146 Budapest, Thököly út 58-60. Telefono: +36-70-932-7464

<http://esperantohea.hu>

dr.markus.gabor@gmail.com

Presejo: Vareg Hungary Kft., Budapest

警世恒言：“如果你作一年计划，请你播种！
如果你作十年计划，请你植树！
如果你作百年计划，请你育人！
如果你播种，你只能收一次谷。
如果你植树，你就可采十年果。
如果你育人，你就可百获其益。

管子”

En ĉi tiu eldonaĵo ĉiuj hungaraj, japanaj, koreaj kaj ĉinaj nomoj aperas en iliaj originalaj formoj, do la familia nomo troveblas unue kaj la persona nomo poste. Laŭ tio ekzemple la familia nomo de la aŭtoro estas Márkus kaj lia persona nomo estas Gábor. La ĉi tie represitaj verkoj estis rekonstruitaj de la originalaj verkoj, pere de perkomputila teksto-prilaboro. Hideg Sándor signife kontribuis al la gramatika korekto, la traduko de tekstoj, la bildredaktado kaj la preseja preparlaboro kaj pro tio la aŭtoro sincere dankas.

推廣世界語，增
進各國人民之
間的友誼和科
技交流。

楊波
九月

„Popularigu Esperanton por akceli amikecon inter divers-
landaj popoloj kaj interŝanĝon de sciencoj kaj teknikoj!”

Yang Bo
Konstanta komitatano de la Tutlanda Popola Kongreso
kaj eksministro de la Malpezindustria Ministerio



Prof. Dr. Johannes Hirschmeier, SVD, President of the Nanzan University
(写真提供：南山学園資料室)

Prof. Dr. Akashi Yoji, Dean and Director of the Center for Japanese Studies



前言

我认识本书的作者是在上世纪六十年代后期，那时，他从一座平原小镇，我从多瑙河对面的一座村庄，来到匈牙利首都，开始我们在布达佩斯经济科技大学的学习。大学课程结束以后，马尔库什嘉博尔，因为自己懂英语、俄语、世界语和日语等多种语言，获得了去日本名古屋的南山大学继续学习的机会，并成功完成学业，因为研究日本经济发展方面的成绩获得了博士学位。

在日本名古屋，世界在马尔库什嘉博尔面前展开。在那里，他从哈佛大学国际知名的教授Johannes.Hirschmeier博士的著作里，知道了日本的工商业组织，如何使用企业导向的方法，使自己的企业能在全世界众多专业领域成为强有力的竞争者。在华盛顿-乔治大学博士、日本人Akashi Yoji教授指导下，他学到了日本如何在二战结束后，建立和形成自己的国际关系，使自己能在世界市场成为一个领导者的角色。

回到欧洲以后，马尔库什嘉博尔继续和东亚的一些科技和文化组织合作。他邀请了Akashi Yoji, Mizuno Yoshiaki, 沈澄儒和 So Gilsu等专家学者来这里的大学，演讲战后日本、韩国以及现在的中国经济发展的成就。沈澄儒教授还邀请他出席了在北京举行的国际学术会议，在广东暨南大学演讲了匈牙利的经济发展体系，促进各方科技、经济、和文化合作的发展。


东欧剧变以后，匈牙利建立了新的民主宪政体制，作者当时担任了国会审计监察组织的领导职务。在这个岗位上，他领导了国会审计监察组织宪法发展项目，使匈牙利能够加入到欧盟。在这项工作中，它有效地利用了自己在日本的大学学到的经验和语言知识，不仅监督了政府，还以自己的咨询、演讲和在专业杂志发表的文章，帮助了各个政府部门的工作。

作者发表了不少记述自己在所游历过国家的经验的旅行报告这些作品被翻译为多种语言，如：“Ruĝa suno kaj verda stelo”，“Vörös nap és zöld csillag”，“赤い太陽と緑の星”，“Trans la Flava maro”，„황해를넘어서”.并结集为：《红太阳与绿行星》出版。书的中国版要感谢彭争鸣先生(Trigo)的准确汉译，

我希望，通过读这本书，能鼓励中国读者也勤奋地学习欧洲语言，以期能够富有成果地贡献于东亚各国人民之间、乃至生活在欧洲中部的亚裔匈牙利人民之间科技、文化和经济关系的发展，

我乐于看到，该书也以国际语言出版。读到该书，显而易见，世界各国的世界语者们容易沟通起来。我也同意：国际语言的学习有效地帮助着当今世界人际理解和友谊的发展

2012年9月2日，布达佩斯



Boros Imre博士

前欧尔班政府内阁成员

负责加入欧盟事务的不管部部长

农业和地方发展部部长

ENKONDUKO

Post la fino de sia studprogramo en Nanzan Universitato en japana urbo Nagoya D-ro Márkus Gábor vigle agadis en Eŭropo por disvastigi la internaciajn sciencajn, kulturajn kaj ekonomiajn rilatojn inter Hungario kaj Orienta Azio. Li invitis pekinan profesoron Shen Chenru al la Budapeŝta Ekonomikosciencia Universitato kaj poste laŭ invito de la Ĉina Sociosciencia Akademio li prelegis en Pekino pri la eblecoj de kunlaboro inter Hungario kaj Ĉinio.

Li proponis, ke laŭ la sukcesaj spertoj en la Speciala Ekonomia Zono en Shenchen ĉinoj enkonduku merkatekonomion en la tuta lando kaj laŭ multmiljara tradicio evoluigu la edukadon por konstrui sukcesan kaj riĉan ekonomion en la plej granda lando de la mondo, kie pli ol unu miliardo da homoj vivas. Liaj prelegoj estis tre sukcesaj, ilin vigle diskutis en universitatoj kaj akademioj kaj oni aperigis ilin ankaŭ en ĉinlingvaj ĵurnaloj.

Post tridek jaroj en Eŭropo oni jam ĉiutage spertas, ke ĉinoj konstruis tre altnivelan, bone funkciantan nacian ekonomion, kie la evoluo estas pli rapida ol en landoj de la Eŭropa Unio aŭ en Ameriko. La ĉina merkatekonomio estas tre sukcesa, multaj grandaj ĉielskrapantaj konstruaĵoj aperas en la grandaj urboj unu apud la aliaj kaj ankaŭ la vivnivelo signife altiĝis. Ankaŭ la internaciaj ekonomiaj kaj komercaj rilatoj signife pligrandiĝis kaj dum la lastaj jaroj jam verŝajne pli da ĉinaj restoracioj troveblas en Budapeŝto ol hungaraj kaj en ĉiuj vendejoj abundas ĉinaj industriaj produktaĵoj.

Nuntempe D-ro Márkus Gábor estas komitatano de la Universala Esperanto Asocio kaj tiel regule vizitas internaciajn kongresojn kaj konferencojn. Tiel okazis, ke post tridek jaroj revojaĝis al Orienta Azio kaj pri siaj spertoj verkis sukcesajn librojn kiuj aperis en multaj lingvoj. La titolo de tiu libroserio estas “Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo” kaj la plej nova volumo de tiu libroserio temas pri Vjetnamio kaj Ĉinio. En la unua parto de la libro oni reaperigas la tridekjaraĝajn artikolojn de la aŭtoro kaj en la dua parto li skribas pri siaj novaj spertoj en la nuna moderna Vjetnamio kaj Ĉinio.

D-ro Márkus Gábor regule partoprenas internaciajn konferencojn kun ĉinaj lingvoinstruistoj kaj surpriziĝis vidi en korea urbo Iksan kia altnivela la lingvoinstruado en Ĉinio estas. Li kun koreaj profesoroj kortuŝiĝis vidi kiel bonkore donacis Prof-ino Song Ping, harbina instruistino valoran ĉinan pentraĵon al koreaj gesamideanoj.


Ni, la estroj de la pli, ol centjaraĝa Hungaria Esperanto Asocio kun ĝojo kanstatas, ke D-ro Márkus Gábor efike uzis kaj uzas ankaŭ la internacian lingvon en sia faka kaj profesia agado. Kiam li estis strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo, same kiam li estis estro de nia parlamenta kontrolo kaj aŭditora organizo, li ĉiam serĉis la eblojn por konstrui fortajn kaj viglajn internaciajn rilatojn en sia faktereno.

Per liaj prelegoj, artikoloj kaj verkoj, kiuj nun estas aperigataj kaj reapergitaj, evidentiĝas, ke en la dudekunua jarcento krom la angla, rusa, franca, ĉina, ktp. mondlingvoj ankaŭ la facile lernebla, neŭtrala internacia lingvo estas bona kaj taŭga lingvo por pligrandigi la internacian kulturen interŝanĝon. Pro tio ni kun ĝojo subtenas la eldonon de tiu ĉi libro. Kiel ekonomisto, la aŭtoro ofte komparas salajrojn kaj prezojn de diversaj produktaĵoj kaj tiamaniere helpas la legantojn por konkludi: kia la vivnivelo estas en diversaj landoj.

En urbo Budapeŝto, la 24-an de Septembro, 2013.



Szabó Imre
prezidanto



Lindwurm Edit
ĝenerala vicprezidanto



Nagy János
vicprezidanto



Unua Parto

ARBOPLANTADO EN PEKINO




高博尔·马尔库什贺词

在世界语世界这样一次重要的科学会议上我诚挚地向大家问候。我来自遥远的欧洲国家匈牙利，在那里人们痛感语言隔绝之苦，正如在这里中国一样。在中国，语言问题的根源和国际交流的困难在于中国人使用独一无二的语言和特殊的书写方式，外国人无法阅读和理解。在匈牙利，匈牙利人也使用独一无二的源自亚洲的语言。欧洲其他国家的人也不可能理解。众所周知，匈牙利人几千年前生活在中亚西亚，因此，匈牙利语言的结构是亚洲类型的，与其他欧洲语言的结构绝然不同。

然而，尽管所有的语言都存在着学习上的困难，但是熟悉其他国家的研究成果，并以这种方式加速本国技术和经济的发展仍然是当今科学家的重要任务。我们认为国际语——世界语是解决世界上相互交往、联系最有效的工具。因此，我希望，本届国际科技会议获得巨大成就，并能给予与会者有关各国科学家最近研究成果的新的有价值的信息。

我祝愿大会获得成功，感谢大会组织者的热情准备，感谢中科院世协，并为之表示祝贺。

(施 展译)



Profesoro Shen Chenru kun la aŭtoro en Budapeŝto. Inter ili la filino de la aŭtoro. videblas en ĉina vestaĵo.

陈昊苏贺词

应邀参加此次国际性的科技方面世界语的盛会，我表示热烈的祝贺。

从一八八七年柴门霍夫博士创立世界语以来，世界语已经有了自身一百年的辉煌历史。我曾经在今年上半年向世界语之友会提出，在第二个一百年开始之际，应该规划一下在更大的规模上推广世界语的远景。为此，我建议发起一个“世界语十年”的活动。按照我的设想，在这个世界语十年中，应该争取世界语者的数量有一个大的发展，还应该争取世界语的活动领域更加广泛。比如世界语应该深入到科学技术的领域里去，这当然就要依赖科技领域内的世界语者做出更大的努力。

我希望我们今天的这个集会，就是一个实际的进展。我相信各位是不会使我们失望的。

刚才我翻阅了本次会议的材料，其中有匈牙利的马尔库什博士一篇文章的题词：“如果你做十年计划，请你植树！”我希望我们现在所做的事，就是为这个世界多植绿色的树，使之与世界语的绿色之星相辉映，让我们的世界变得更美好！



技术发展在匈牙利经济 改革政策中的作用

工业经济科学顾问

高博尔·马尔库什博士

警世恒言：“如果你作一年计划，请你播种！
如果你作十年计划，请你植树！
如果你作百年计划，请你育人！
如果你播种，你只能收一次谷。
如果你植树，你就可采十年果。
如果你育人，你就可百获其益。

库安·丘”

第二次世界大战结束后的40多年中，匈牙利的经济生活发生了巨大变化。经济发展的最主要成果是在六十年代和七十年代取得的，当时经济发展的方针比较灵活，国民经济发展得也比较快。这一时期取得的成果是国际上公认的。

1960年以后，国民收入增长三倍，工业生产的发展速度甚至更快，这段时间的农业生产也增长两倍。因此国民的实际收入和消费水平都得到了提高。此外，劳动条件、生活条件普遍获得改善。国家有效地解决了失业问题。因此可以说，由于这个时期的经济方针政策，人们成功地创造了比以往任何时候都好的社会和人民生活的安定局面。

而在近15年中，世界经济发生了根本的变化。因此，根据这一变化了的环境，在匈牙利建设社会主义社会和经济才成为可能。这就是说，有必要为国家的经济选择一条比以前更迅速、更有效地适应日益变化着的世界经济条件的新的发展道路。匈牙利社会主义工人党和政府领导人已经认识到这样的形势，并为解决这

个问题在1987年下半年制订了新的经济改革纲领。

在这个政府纲领中，加速技术发展具有深远的意义和重要的作用。这个纲领的正式名称叫“经济和社会发展纲领”，它强调加速技术发展的必要性，因为政府认识到，在现在的国际市场上，如果商品不能体现当代科学技术革命的最新成果的话，那末就不能从出售商品中获益。

这就意味着，更新生产结构势在必行。这种更新就是匈牙利国民经济结构的现代化，必须在今后的几年中加以完善。这个工作纲领最基本的目标是：

- 加速对集约化发展的适应性；
- 提高对世界经济发展趋势的适应性；
- 促进生产结构的现代化；
- 加速技术发展；
- 提高效率。

为了实现这个复杂的目标体制，需要全面推进经济改革进程的发展。应该了解，上述目标是不能孤立地进行分析的，它们之间有着各

种不同的相互关系。

我认为，在上面的各种目标中，加速技术开发是最重要的。这就是说，如果达到了这个目标，那末同时也就能够实现其他目标。例如技术开发必定促进新的现代化产品的研制，新的现代化产品在国际市场上就有竞争力，因此，如果人们能够明智而又合理地支援和加速技术开发，那就意味着，同时也有助于加速国民经济适应世界经济的发展趋势。

如果技术开发能促进产品成本的降低，那么，同样地，它也就意味着，依仗技术开发的成果，生产效益也能提高。因此，我确信，技术开发是经济发展中最重要的组成部分，它的效益比其他部分的效益持续的时间更长久些。

如果人们持有这种认识，那末就会得出结论：用于智力（教育、医疗服务等方面的）投资比以前人们所认为的要有更长远、更重要的效果。原因很简单，是不言而喻的：只有受过良好教育的劳动力才能把经济发展中的最重要的组成部分技术开发推向前进。

前美国经济学家协会主席 Theodore Schultz，在他作的关于美国对第三世界发展中国家援助项目的效益的总结结论时也有同样的认识。（请看Th. Schultz：在美国经济学家协会第七十届年会上有关智力投资部分的讲演）他证实，同样的美国生产设备在第三世界国家中所产生的效益要比在西方工业国家小得多。原因是：在第三世界的发展中国家里缺少受过教育的劳动力，而在西方工业国家里正是这些受过教育的人为在生产中有效地运用现代技术提供可能。

因此，如果高度发达的工业国家要想有效地帮助第三世界，只提供现代机器设备是不够的，更重要的是，要培训他们。

除上面提到的发展中国家的消极经验，还有一个正面经验能够支持我的主张。1982年和1984年，我在日本中部的南山大学时，曾在名古屋同来自20多个国家的大学生和教授一起分

析了日本经济迅速发展的最重要因素，其结论同当地研究小组是一致的。这个所谓“日本经济奇迹”的最重要的因素就是日本技术的迅速开发，高等普及教育体制，持续地采用现代化技术，和生产的持续结构性的发展。

匈牙利的科学家们在各种专业性报刊上的长期讨论中也弄清楚了60年代技术革命的基本作用和人的因素在经济发展中的重要性。此后，在各类大学的教材和各地方政府和党的行动纲领中，从理论到实践都强调这个事实。

1987年通过的政府经济发展纲要深刻地、意义深远地阐述了这个问题。这个纲要规定，企业要根据高效益的技术进步成果提高自己产品的质量和技术水平。同时还必须发展同市场的联系，概括地说就是发挥市场作用。

就是说，现代的先进工业领域要比总的发展水平更快些。比如，在最近两年中，匈牙利总的工业发展速度是1.3—1.4%，同期运输工具制造工业发展速度为3.7%，电子工业为6—7%。但是根据计划，到1990年将占32%，现代的先进工业现在只占整个工业比重的28%。

为了达到政府提出的目标（为使经济结构现代化）对劳动岗位必须进行调整。随着工业结构的现代化，据研究和工会的分析，有十万人必须调整工作岗位。匈牙利工会对工业结构现代化的必要性是理解的，但决不允许在这个过程中出现失业。为了避免这种现象，有必要重新教育提高这一部分人的知识水平，使他们能够尽快在更有效的现代工业结构中的其他工作岗位进行有效的工作。

结论：当前匈牙利社会经济发展的政府纲领中，最重要的任务就是生产结构的现代化，加速技术开发。这是改善国家财经形势的条件，同时也是搞活未来生产的条件。为了给提高人民今后的生活水平创造安定的环境，必须完成以上任务。

徐婉芬译

高博尔·马尔库什 在闭幕式上的讲话

尊敬的代表们！

最近七天，在中国首都北京发生了举世瞩目的重大事件。来自各大洲众多国家的1400多位科学工作者聚会于此，在划分为六个专业组的范围内讨论了诸如数理化、地学、技术、经济、医学与生物、语言与教育等不同科学领域中的最重要的问题。

三周前在荷兰鹿特丹市召开了第73届国际世界语大会，其议题是：“科学技术与人类的相互理解”*。在这届大会上，2300位代表一致强调国际语在科学和专业上的应用对于人与人之间更有效的了解是十分重要和必要的。

在第二次世界大战后的四十年间，几乎所有的荣获诺贝尔奖的经济学家都强调技术与经济发展之间相互关系的重要性。在这次学术会议上宣读的几篇论文也表明，世界上那些在经济发展上取得重大成就的国家，它们的技术发展也是最迅速的。

如果人们能迅速地了解其他国家科学家的最新成果，那么他们就能推进本国的技术发展，而这次国际科学会议确实有效地促成了国与国之间的科学交流。人们每天都能体会到，各国乃至各大洲之间的科学和贸易合作已经在这里开始了，这种合作有助于外国人更加真实地了解中国科学活动的现状。与此同时，这种合作也会有效地促进中国科学的发展，从而更有效地解决四化建设中的重大问题。

在这次会议即将结束之际，我已收到上百张新结识的中国朋友、著名的科学家和同行的名片。这可能是将来在科学和经济上开展有价

值的合作的开端。我本人参加了地学和经济学分组讨论会。在此，我怀着极大的喜悦证实，特别是在经济学分组会上，与会者不仅宣读了论文，而且在某些论文宣读后进行了活跃的高水平的讨论。这充分体现出当今中国的开放政策和科学家们渴求了解新的科技信息的浓厚兴趣和强烈愿望。

下面是我在经济学分组会上宣读的那篇论文篇首引用的格言：

“一年之计，莫如树谷！
十年之计，莫如树木！
终身之计，莫如树人！
一树一获者，谷也。
一树十获者，木也。
一树百获者，人也。”**

而现在，在大会即将结束之时，我可以这样说：在整个会议期间，我们是在“树木”而非“树谷”，各国科学家彼此之间交流了经验和研究成果。因此，我们可以指望多获其益。而此时此刻绝非只是会议的开始，而且是未来富有成果的科学的开端。

* 对大会的议题似应作这样的理解：全力支持科学技术的进一步发展和普及，积极参加有助于人类相互理解的活动。简译为：支持科技发展，促进人类相互理解。——本刊编者

** 引自《管子·权修》——译者

（张大卫译）



第二届国际世界语科技学术会议

GRAVA SCIENCA KONFERENCO EN PEKINO 1

Faktoj kaj esperoj

Dum la lastaj jardekoj Esperanto akiris pli kaj pli gravan rolon en la internaciaj sciencaj kontaktoj. Per la subvencio de la japana Entrepreno Verda Stelo kaj poste per la stipendio de Nanzan Tomonokai mi plenumis postuniversitatajn studon kaj esplorojn inter 1982-1984 en la Universitato Nanzan en urbo Nagoja (Japanio). La rezultojn de miaj esploroj mi resumis en doktora disertacio.

En miaj esploroj mi analizis la ĉefajn faktorojn de la procezo, kiu rezultigis, ke tiu ekstremorienta insullando dum kelkaj jardekoj post la dua mondmilito - unike en la mondo - pli ol centobligis la nominalan bruttan nacian produktaĵon, kaj ĝis 1968 tiel ĝi fariĝis la dua plej forta ekonomia potenco laŭ la ekonomiaj evoluinteco kaj povo; ĝin antaŭas nur Usono.

Spertante la japanajn ekonomievoluigajn sukcesojn, pli kaj pli multaj sudorient-aziaj landoj provis apliki certajn elementojn de la japana modelo por akceli la evoluritmion de sia ekonomio. La plej gravaj estas sur tiu kampo la rezultoj de Hongkongo, Tajvano, Sud-Koreio kaj Singapuro, nomataj en la internacia ekonomika fakliteraturo "la kvar tigroj". La pragmatisma ekonomipolitiko, signita per la nomo de Teng Hsiao Ping, volas ellevi Ĉinion ĝis la jarmilturno el la vico de la ekonomie postrestintaj landoj de la mondo.

Kun nova elano

En la unua periodo post la dua mondmilito la kontaktoj inter Ĉinio kaj Hungario evoluis multpromese. Sur pluraj kampoj hungaraj fakuloj helpis fruktodone la restarigon kaj evoluigon de la ĉina ekonomio, ekzemple la malkovron de la plej granda naftejo de Ĉinio partoprenis la inĝenieroj de la budapesta Geofizika Esplorentrepreno.

Poste tiuj kontaktoj signife refalis. Dum la jaroj de la kultura

revolucio praktike ne ekzistis supera instruado en la lando kaj la ekonomio malkombiniĝis. La eliro el tiu kaosa stato komenciĝis dum la okdekaj jaroj, kiam laŭ novaj principoj oni komencis reorganizi la ekonomian vivon de la lando kun kontinenta amplekso.

Ekde tiam en la tuta lando estas kuraĝigitaj la privataj entreprenoj, kaj estiĝis t. n. "speciala ekonomia zono" sur la suda apudmara teritorio, kie ili deziras absorbi la okcidentan pintan teknologion, altirante la eksterlandan kapitalon, kadre de ĉinaj-japanaj, ĉinaj-hongkongaj, ĉinaj-usonaj miksitaj entreprenoj.

La scienca esplorado estas nuntempe denove leviĝanta, sinsekve oni organizas sciencajn konferencojn en la tuta lando, kaj multnombre oni sendas al Usono la talentajn ĉinajn gejunulojn.

Kvinono de la homaro

Eĉ en tiu serio estis elstare grava la 2a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto organizita de la Ĉina Scienca Akademio, okazinta en Pekino inter 10-16 de aŭgusto 1988, kiun partoprenis 1300 fakuloj el 20 landoj. La oficiala lingvo de la konferenco estis Esperanto.

La konferencon el Hungario partoprenis nur mi, kaj mi prezentis po unu prelegon en la sekcikunsidoj ekenomika kaj geologia. En tiu ĉi lasta sekcio estis prezentataj tre multaj teoriaj prelegoj pri la rezultoj de la plej novaj ĉinaj geologiaj kaj geofizikaj esploroj. En la 2a afro-azia regiona petrolokemia kaj esplora konferenco la ĉinaj geofizikistoj publikigis eĉ konkretajn praktikajn rezultojn: ili sukcesis malkovri metangas-kuŝejon kun supozeble dek bilionoj da kubometroj pere de la geofizikaj pritaksaj metodoj evoluigitaj de ili.

Tiuj fakaj rezultoj estas gravaj ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por Eŭropo, ĝenerale por la tuta okcidenta mondo. Ĉar ne povas esti indiferece por la mondo, ke unu miliardo de homoj, kvinono de la tuta loĝantaro de la tero, kiel povas certigi por si mem la bazmaterialojn kaj energifontojn bezonatajn por pluevoluigi sian ekonomion.

La Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS) fondiĝis la 1an de novembro

1949, kiel tutlanda sciencorganiza kaj esplora centro por natursciencoj. La akademio funkciigas 123 esplorinstitutojn en 21 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, krome pli ol 20 aliajn sciencajn organizaĵojn, kiel la Ĉinan Scienc-Teknikan Universitaton, bibliotekon, eldonejon, ktp. La nombro de la dungitoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj estas nunmomente 82.700, el kiuj 52.600 estas ekspertoj, alt- kaj mezgradaj sciencaj esploristoj kaj teknikaj ekspertoj.

Ankaŭ la internacia agado de ĈAS estas tre grava. Ekde 1978 ĝi establis daŭran, laŭkontraktan kunlaboron kun sciencaj akademioj, teknikaj sciencaj institucioj kaj universitatoj de kvin kontinentoj. Al la plifortigo de la internaciaj sciencaj kontaktoj signife kontribuas ankaŭ la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tial verdire mi neniam havis nesolveblajn komunikajn problemojn en Ĉinio, ja mi flue uzas Esperanton, krome dum la studado en Japanio mi ellernis grandan parton de la ĉinaj literoj.

Vizitkartojn!

Dum la 2a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto la kompreniĝon plifaciligis por mi, ke la prelegojn, prezentitajn kadre de la konferenco, la Ĉina Akademio de Sciencoj aperigis ankaŭ ĉine en sia trimonata revuo Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj. La konferencon malfermis la prezidanto da la estraro de ĈAS, kaj la gravecon de la aranĝo analizis la telekomunika vicministro de la centra registaro. Kvankam la oficiala malfermo estis anoncita por la oka horo, la partoprenantoj kolektiĝis nur je la oka kaj duono.


Por eksterlandaj partoprenantoj, kutimiĝintaj al Eŭropaj sciencaj aranĝoj, estis strange, ke inter la prelegoj en la kunsido senĉese iris-venis homoj. Plej multaj el la partoprenantoj fotis la estraron kaj la aksterlandanojn, sed ankaŭ la estraranoj senĉese iris-venis. La prezidanto de la organiza komitato ekzemple ankaŭ min malkovris nur post la malfermo de la kunsido en la aŭskultantaro, kaj li venigis min pere de asistantino en la estraron. Tial tie ĉiu devis sidiĝi sur la najbaran seĝon.

La kunsido komenciĝis per laŭtega muziko de cimbaloj kaj tamburoj. Kelkaj el la aŭskultantoj sidis vestitaj per soldataj uniformoj. La malferma parolo de la prezidanto estis interrompita plurajn fojojn per aplaŭdo. Por mi estis surprize, ke simplaj ĉinoj amase petis vizitkartojn de mi kaj de aliaj membroj de la estraro, kelkaj eĉ dum la oficiala malfermo venis tiucele al la estrara scenejo.

Komparoj banalaj

En la antaŭaj jaroj en Japanio mi plurajn fojojn partoprenis similajn aranĝojn, sekve mi havis eblon kompari la du ekstremorientajn landojn. La plej grava diferenco estas, ke en Japanio la homoj estas multe pli disciplinitaj. Mi memoras, kiam printempe de 1983 mi prezentis mian unuan japanlingvan prelegon en la Rotaria Klubo de Iĉinomija, la organizantoj petis min paroli ĉ. 6-8 minutojn. Kiam mi konsente kapjesis, ili redemandis, do mi parolos ĉu 6 aŭ 8 minutojn. Tiam mi diris ok minutojn, sed - ĉar tio estis mia unua japanlingva prelego - mi ne povis bone kalkuli la tempodaŭron, kaj la parolon mi finis post kvin kaj duonminutoj. Tiel mi sukcesis ekstreme embarasigi la organizantojn, kiuj ne povis abrupte kion komenci pri la tiel estiĝintaj du kaj duonminutoj.

En Ĉinio mi spertis ĉiutage, ke la realigo de la planoj povas malfrui ne nur minutojn sed horojn, eĉ tutajn tagojn. Post unu semajno mi jam ne estis surprizita, kiam iu firme promesis min esti hejme sekvatage je la oka, ĉar li nepre volas paroli kun mi, kaj li sekvatage entute ne venis al mi. Estis aparte feliĉe, se hazarde mi renkontis lin je la dekunua en la parko de la universitato.



第二届国际世界语科技学术会议

GRAVA SCIENCA KONFERENCO EN PEKINO 2

En nia pasinta numero ni diskonigis iom el la abundaj ĉiniaj travivaĵoj. Nun ni turnu nian atenton al la aliaj ekstrem-orientaj landoj.

Koreaj impresoj

La organizado de peraviadilaj eksterlandaj vojaĝoj fariĝis iom komplikaj por hungaroj ekde kiam ili devas pagi 100% da imposto por ĉiuj aviadilbiletoj al socialismaj landoj. Tamen laŭ la nuna reglamento oni ne devas pagi tiun imposton se oni aĉetas tiujn biletojn eksterlande - do tiel la biletoj kostas nur duonon de la hungara prezo. Ankaŭ mi decidis unue iri al Bratislava en Ĉekoslovakio por aĉeti duonpreze la biletojn.

El Bratislava unue mi flugis al Moskvo, tie mi elektis la aviadilon de korea flugkompanio Chosonminhang. Post tutnokta laciga vojaĝo mi alvenis en Fenjano (Pyongyang). Tie en la aerodromo jam atendis min la ataŝeo de la tiea hungara ambasadorejo, kun kiu ni rekte aŭtis al la ambasadorejo, kie mi pasigis la nokton ĝis la sekvataga forvojaĝo.

Trafiknumero 216

Post la hungara gulaŝo kaj freŝiga bano mi decidis promeni iom en la urbo. La unua surprizo por mi - kiel verŝajne por ĉiuj eŭropanoj - estis, ke en la urbo ĉie svarmis soldatoj kaj policanoj. Kvankam ĉe la ĉefaj vojkruciĝoj de Fenjano estis establita la trafiklum-aparatoj, tamen tiuj ne funkciis. La trafikon direktis junaj policaninoj perbrake. Estis surprize, ke ĉiuj aŭtomobiloj de la Centra Komitato de la komunista partio surhavis la trafiknumeron 216, ĉar la filo de Kim Ir Sen (Kim Il Sung) nomata kiel "nia estimata kaj amata Granda Gvidanto" naskiĝis en la 2a monato la 16an tagon. La policanoj rimarkante aŭton kun trafiknumero 216, tuj certigis por ĝi verdan vojon.

La plej granda surprizo por mi tamen estis, ke en la tuta urbo mi trovis eĉ ne unusolan manĝaĵvendejon. En Koreo funkcias rigora kuponsistemo, laŭ kiu koreanoj akiras la varojn por vivteno pere de siaj laborejoj kaj loĝloko. La averaĝa salajro estas iom malpli, ol 1000,- Ft (ĉ. 35 ned. gld. – la red.) sed gravan parton de tiu sumo koreanoj kutime redonas al la ŝtato. Kvankam vere, en la naskiĝtago de Kim Ir Sen, en tiu de lia filo, kaj eble ankoraŭ en du aliaj ŝtatfestoj ĉiuj civitanoj ricevas de la ŝtatestro iun donacon: viandon aŭ legomojn por unu kuro, kompleton, ktp.

Stampoj kaj monbiletoj

Por eŭropanoj estas stranga, iom nekutima ankaŭ la korea monsystemo. En Koreo la oficiala valuto estas vono (won), la malpli granda monunuo estas ĉono (chon). Eksterlandanoj uzas stampitajn bankbiletojn, kiuj montras, ke tiu mono estas ŝanĝita kontraŭ eksterlanda valuto. La koloro de la stampo aludas ankaŭ pri tio, ĉu la monbileto estis ŝanĝita kontraŭ konvertebla (ruĝa) aŭ socialisma valuto (blua).

Tiu distingo estas videbla ankaŭ ĉe aluminiuj ĉonoj (koreaj fileroj). Kontraŭ konvertebla valuto oni donas ĉonojn kun du asteriskoj, kontraŭ socialisma kun unu; la fileroj uzataj de koreanoj tute ne surhavas asterikson. Eksterlandanoj rajtas uzi nur la markitajn monerojn, kvankam staras je ilia dispozo nur unusola vendejo por akiri la bezonatajn manĝaĵojn kaj teknikajn artiklojn.

Unuecaj prezoj eĉ en vonoj ne ekzistas. Koreanoj rajtas aĉeti en la menciita vendejo nenion; kaj por la varoj eksterlandanoj devas pagi malsamajn prezojn depende de tio, kiukolora estas la stampo. En la manĝaĵsekcio sur la teretaĝo - kiu estas malpli bone provizita ol ajna hungara vilaĝa vendejo - inter la aĉetpovo de la duspecaj monbiletoj la diferenco estas ĉ. 20%. Sed en la teknika sekcio sur la dua etaĝo oni devas pagi sesoble pli per blustampaj monbiletoj ol per ruĝastampaj. Koreanoj evidente ankaŭ ĉi tie povas aĉeti nenion kontraŭ sia mono.

Mi promenanta surstrate estis verŝajne tre okulfrapa, ja mi vidis neniun promenantan eksterlandanon krom mi en la urbo, kaj mi rimarkis, ke la homoj nekaŝite spektadis min, precipe la infanoj tra la rompitaĵaj fenestroj de aŭtobusoj. Tamen neniu alparolis min. El la antaŭaj konatoj mi renkontis nur unusolan: la cikadoj - konataj tre bone el miaj studentjaroj en Japanio - aŭdigis la saman oreŝiran bruon kiel dum la vesperoj en Tokio.

Ĉuĉeo kaj triumfarko

En la korea ĉefurbo cetere, malgraŭ la malriĉeco, videblas monstraj konstruaĵoj sur ambaŭ bordoj de la riverego trafluanta la urbon. Okaze de la sepdeka datreveno de la naskiĝo de prezidanto Kim Ir Sen estis konstruita pli granda kopio de la pariza triumfarko. Rekte sur la riverbordo altas ankaŭ la enorme granda monumento gloriganta la eternan ardadon de la ideo "ĉuĉe-o" ligita al la nomo de la prezidanto. Aliborde pozas statuto de Kim Ir Sen, pli ol 20 metrojn alta.

La ideo "ĉuĉe-o" deklaras memstarecon sur ĉiuj kampoj; kaj ĝia filozofia enhavo estas, ke homo estas reganta super ĉio. En la ekonomio tio signifas la ekspluatadon de la propraj fortoj, sur soldata kampo la sindefendon, en la politiko la teritorian suverenecon kaj sendependecon. Por studi tiujn kimirsen-an idearon certigas favorajn kondiĉojn la Palaco de Grandaj Popolaj Studoj.

Sed mi ne havis tempon por konatiĝi pli profunde kun la korea vivo, ĉar la sekvan tagon tagmeze mi pluvojaĝis al Pekino. La vagonaro kuregis tra monotonaj ebenejoj, videblis eĉ ne unusola fabriko aŭ uzino. En ĉiuj stacidomoj pendis la portreto de la prezidanto, kaj la apudfervoĵajn vilaĝojn ne eblis vidi, ja la maizoj ĉirkaŭ la domoj estis pli altaj ol la konstruaĵoj.

Ĉinio eksalute

Finfine vespere ĉirkaŭ la kvina mi ekvidis fumon de fabrikkamenoj trans grandega riverego Yalu, kies ponton trairante la vagonaro kuras plu jam sur ĉina tero al Pekino. La unua konstato estas - komparante kun koreanoj - la homoj en Ĉinio jam manĝas ion. En Koreo - kie ĉio okazas laŭ kuponsistemo - mi vidis eĉ ne unu manĝaĵvendejon, kaj

jen: ĉi tie mi vidis tra la vagonfenestro grandajn melonamasojn. Abundis fruktoj en la kamparo ĉie apud la reloĵoj.

Sur la perono de ĉiuj stacidomoj "atakas" la pasaĝerojn kolportistoj ofertantaj unupladajn manĝaĵojn en plastikaj skatoloj, dolĉaĵojn kaj senalkoholaĵojn. Unupladaĵo - konsistanta kutime el rizaĵo, legomaĵo kaj eble viandaĵo kaj ovaĵo - kostas unu kaj duon juanojn.

La ĉina monsystemo estas ekstreme komplika. Du specoj de mono cirkulas: renminbio (popola juano) kaj "feco", ricevita kontraŭ eksterlanda valuto. Tiu lasta prononcendas "efisi", ĉar ĝi estas mallongigo de „foreign exchange certificate" ('atesto pri monŝanĝo').

Laŭ la anglalingva teksto sur fecoj: 1 feco egalas 1 renminbion. En la praktiko la eksterlandanojn surstrate ĉiupaŝe alparolas ĉinoj proponante 60-70 procentojn pli por fecoj. En la plej granda magazeno de Pekino, en "Friendship Store" ('Butiko Amikeco') por filmrivelado oni devas malpli pagi per fecoj. En certaj lokoj tamen, ekz. en stacidomoj, hoteloj frekventataj de eksterlandanoj oni akceptas nur fecojn. Oficiale unu dolaro egalas cetere 3.6 juanojn.

La oficiala monunuo de la lando estas juano; 1 juano estas 10 ĵiaoĵ (nomataj en Pekino: maoĵ), 1 ĵiao estas 10 fenoj, do 1 juano estas 100 fenoj. Ĉar fenoj estas uzataj en du formoj: kiel bankbiletoj kaj kiel moneroj, montrantaj la valoron nur ĉinlitere, eksterlandano - almenaŭ komence - orientiĝas malfacile. Ankaŭ la bankbiletoj juanoj kaj ĵiaoĵ diferencas inter si laŭ la valoro kaj depende de tio, ĉu temas pri malnovaj aŭ novaj moneroj.

Kiel pagi malpli?

La prezoj cetere - escepte hotelojn - estas en Ĉinio tre malaltaj. Dum la konferenco mi loĝis en universitata studenthejmo, tial mi ne devis elspezi multe. Tiel post la enpoŝigo de mia honorario por la prelegoj en ĈAS, por mi la plej granda problemo estis kontraŭ kio elspezi tiun amasegon de miaj popolaj juanoj. Por mi certigis ŝparadon ankaŭ, ke mi konas la ĉinajn literojn (ideogramojn) - ja antaŭe mi vizitis japanan universitaton - tiel mi spertis surprizite: en multaj lokoj, precipe en muzeoj, oni informis pri la enirprezo ĉine kaj angle. Kaj

inter ili estis eĉ kelkfoje 200% da diferenco. Sekve plej ofte mi pagis la pli malaltan.

Por eŭropanoj estas surprizaj ankaŭ la prezoj. Brando kostas malpli ol biero, biero kostas malpli ol kolao. Duonlitra da 30%-a spicita brando kostis 1 juanon, la prezo de unu botelo da biero - depende de la speco - kostis inter 1.10-1.70. Skatoleto da kolao kostis 10-20 fenojn pli multe, sed ankaŭ simpla mineralakvo kostis pli ol brando.

La vagonaro kutime alvenas je la 10a matene en la Pekina stacidomo. La alvenon mi atendis trankvile, ĉar en alia sociscienca konferenco en Roterdamo, semajnon antaŭ mia vojaĝo al Ĉinio, mi renkontiĝis kun profesoro Shen Chenru, unu el la organizantoj de la konferenco. Li diris al mi, ke li reflugas el Roterdamo al Pekino rekte por prepari la akcepton de la alvenantaj konferencanoj. Li zorge surpaperigis miajn trajnnumeron kaj alventempon, kaj li promesis, ke min atendas du studentoj en la stacidomo.

Kiu min atendis?

Post la alveno de la vagonaro evidentiĝis, ke min atendas neniuj. Kiel poste klariĝis, la du studentoj erarvagis kaj ne trovis la trajnon el Fenjano (kvankam el Fenjano venas ĉiutage nur unu vagonaro ...). Fidante al la promeso de mia profesoro, mi ja kunportis nek adresojn, nek telefonnumerojn, sekve mi staris senhelpa en planŝtopita stacidomego de metropolo kun 10 milionoj da loĝantoj. En la halo de la stacidomo kaj sur la placo antaŭ ĝi kuŝis homoj plurcentope sur la tero. Iuj dormis, aliaj manĝis aŭ paroladis atendente la vagonaron.

En Ĉinio la infrastruktura provizado estas katastrofa. Mankas telefonoj, mankas veturiloj; ofte okazas, se iu volas aĉeti bileton al Ŝanhajo, li ricevas la respondon, ke nur post du aŭ tri tagoj estos libera loko en la trajno. Ĝis tiam la malfeliĉa pasaĝero kuŝadas en la stacidomo. Tiajn malagrabraĵojn pro neorganiziteco mi spertis plurajn fojojn preskaŭ ĉiutage, sed mi ĝuis sufiĉan rekompencancon per la unikaj dumkonferencaj ebloj science informiĝi kaj establi fakajn kontaktojn.

第二届国际世界语科技学术会议

GRAVA SCIENCA KONFERENCO EN PEKINO 3

Invitoj, invitoj, invitoj

Post la fino de la konferenco en Pekino, mi ricevis amasegon da invitoj de diversaj ĉinaj sociaj kaj sciencaj organizoj el multaj urboj de Ĉinio. Tamen pro la mallongeco de la tempo mi entreprenis plenumi nur unusolan inviton al Kantono, kien invitis min la Kantona Scienca kaj Teknika Asocio kaj la Universitato Jinan. S-ro Liu Weizhang, sekretario de la asocio proponis al mi loĝi en la asocia gastodomo, S-ro Fang Huiping, profesoro de la universitato, bonvenigis min en la boska studenta kvartalo, malproksime de la urba bruo.

La ekspresa trajno inter Pekino kaj Kantono faras la mil kilometran vojon dum 36 horoj, tiel trajnoj ekveturantaj vespere alvenas la trian matenon en la Sud-Ĉinia urbo. La litvagonoj estas - laŭ azia kutimo - malfermita, do sperteblas tre vigla societa vivo inter la ĉ. kvindek homoj vojaĝantaj en la sama vagono.

La pejzaĝo estas sufiĉe varia. Industriaj zonoj kaj rizkampoj altemas. Post Wuhan plioftiĝas freŝverdaj bambuaj boskoj, kaj ĉirkaŭ Kantono eblas vidi eĉ sovaĝajn bananarbarojn.

Ne plu surprizo

Alveninte en Kantono, unue mi provis renkonti en la stacidomo s-ron Liu Weizhang (post la ĝistiamaj spertoj mi ne surpriziĝis ne trovante lin - ja la vagonaro malfruis plurajn horojn, kaj li ĝuste tiam iris aĉeti matenmanĝon ...). Sekve mi provis telefoni al Fang Huiping en la universitato - evidentiĝis, ke ankaŭ telefonado ne estas tiel simpla. En Kantono mi ne trovis surstratan telefonaŭtomaton funkciantan per monero. Tamen finfine mi trovis aparaton, kiun funkciigis maljunulo en surstrata budo. La telefonkoston oni devis doni al li. Li cetere parolis nur ĉine. Mi jam eĉ tiam ne surpriziĝis, kiam post sensukcesa telefonado mi tamen devis pagi. Malhavante pli bonan solvon, mi

malkovris, ke buso n-ro 33 iras de la stacidomo rekte al Universitato Jinan, do mi enpremis min en la buson.

La buso estis neimageble plenŝtopita, tiom ke estis iuj, kiuj la malgrandajn infanojn endonis en la buson tra la fenestro, ĉar tra pordo maleblis jam eniri. En la universitato min akceptis amike Ke Shi De, vicedestro de la Scienca Esplora Katedro, Fang Huiping, liaj edzino kaj filino. Ili diris, ke mi povos loĝi ankaŭ en la universitata gastodomo, sed - ja Ĉinio fariĝas pli kaj pli malfermita - estas eble, ke eksterlandanoj loĝu ĉe parencaj aŭ amikaj familioj, do ankaŭ ili mem tre ĝoje gastigos min.

En familia rondo

Mi akceptis tiun ĉi lastan eblon. En mia loĝĉambro estis japanaj televidilo kaj fridujo, kaj la lito estis ĉirkaŭita de retoj kontraŭ moskitoj. Tuj post la alveno mi estis invitita al tagmanĝo. Kantona specialaĵo: supo el porka intesto. Mi tamen preferis fruktojn, do mi aĉetis grandan ananason kaj du banangrapolojn de privata komercisto ĉe la universitata pordego.

Mia gastiganto devenas cetere el familio kun laboristmovada tradicio. Lia patro Fang Fang estis la tria plej altranga persono en la provinco, ja li estis la ĉefministro. La edzino mem estis interpretistino de la unua ĉefo, do de la soldatkomandanto. Ŝi kiel fama ĉina belulino foje dancis eĉ kun Chou Enlaj en iu akcepto.

Intertempe alvenis ankaŭ Liu Weizhang. Li jam preparis por mi viziton en Chunsan, kie mi havos la eblon konsultiĝi kun sukcesa distrikta vicpartisekretario pri la nuntempaj zorgoj kaj problemoj de la ĉina gvidantaro. Poste mi persone akiros spertojn en la speciala ekonomia zono.

La zono

La rapide evoluanta Sud-Ĉinia urbego Shenzhen situas en la najbaraĵo de Hongkongo. Kiam post la erao de Mao Zedong, Teng Hsiao Ping eniris la potencon, li kiel pragmatisma politikisto konsideris sia plej grava tasko rapide evoluigi la ĉinan ekonomion.

Por plenumi tiun celon oni denove donis rolon al la privataj entreprenoj, kaj oni denove obeis al la merkataj leĝoj. Kadre de tiu plano estiĝis la marbordaj specialaj ekonomiaj zonoj, kie - esperante rapidan ekonomian evoluon - la registaro kuraĝigas ekfunkciigi ĉinajn-eksterlandajn komunajn entreprenojn. Kvankam okcidentaj ĉinologoj ne povis imagi la enkondukon de iuj elementoj de kapitalisma ekonomiorganizado en parto de la lando - tamen la tempo pruvis la pravon de Teng Hsiao Ping. Hodiaŭ Shenzhen estas metropolo kun nubskrapantoj kaj la vivnivelo pluroble superas la averaĝan vivnivelon de Ĉinio. Estas vere, ke Shenzhen estas rigardata de la ĉinoj kiel eksterlando, ja ili povas eniri tien nur kun speciala permeso.

Ankaŭ por multaj okcidentanoj estis surprizo la establo de la specialaj zonoj. Tamen estis pluraj, kiuj konsideris tiun ĉi paŝon nemalhavebla por la ĉina ekonomio. Armand Hammer, prezidanto de Occidental Petroleum, diris, ke Teng Hsiao Ping eĉ ne estis tiel kuraĝa en la ekonomipolitiko kiel Lenin estis en la dudekaj jaroj. Laŭ ĉefministro Chao Cejang la registaro intencas realigi du ĉefajn celojn: pliigon de la ĉina eksporto (aŭ importanstaŭigon) kaj absorbadon de la evoluinta eksterlanda teknologio.

Tempo estas mono

Elirinte el la klimatizita vagonaro Kantono-Shenzhen mi estis atendata de duopo: Du Shou He, ĉefinĝeniero de Shenzhen Special Economic Zone Development Co., kaj Lee Teck Shiu, direktoro de Espero Enterprises en Hongkongo. Ĉar, malsame ol en aliaj partoj de Ĉinio, ĉi tie tempo estas mono, ni tuj aŭtis al la centro de la Entrepreno por Evoluigi la Specialan Ekonomian Zonon, kie nin atendis jam la gvidantoj de la organizo. Chen Chu Jie, ĝenerala vicdirektoro, Li Yi Zhong, vicestro de la Entreprenodirekta Ĉefsekcio kaj profesoro Cui Shao Jang, vicprezidanto de Huaming Electronic Industry Co. interesiĝis pri la spertoj de la hungara reformo en la ekonomidirektado kaj pri miaj esploroj en la japana Universitato Nanzan. La proksimeco kaj unike rapida evoluo de Japanio kompreneble vekas la interesiĝon de ĉinoj. Ankaŭ Hungario, ja ĝi

estis la unua en la socialisma landaro, kie oni sukcesigis la ekonomian reformon (en la agrikulturo), kiun poste enkondukis ankaŭ Ĉinio.

Poste la ĉinaj partneroj informis pri la ĉefaj rezultoj de la zono, pri la favoraj ekonomiaj kunlaboraj ebloj por la eksterlandaj entreprenoj. Mi eksciis, ke Shenzhen Special Economic Zone Development Co. rajtas okupiĝi pri io ajn (krom or- kaj armilmerkato), ili rajtas aĉetivendi varojn kaj servojn en la monda merkato. Estas eblo ankaŭ ekonomie kunlabori en la tria mondo. Estis menciite, ke pli frue hungaraj geofizikistoj rezulte kunlaboris en la malkovro de la plej granda naftokuŝejo de Ĉinio. La Sud-Ĉinia entrepreno pretas kunlabori kun hungaraj entreprenoj sur la plej diversaj kampoj.

Kiukolora la kato?

Dum la restado en Ĉinio mi havis la senton, ke mi estas en la tria mondo. Ĉi tie en Shenzhen mi tamen pensis, ke mi estas kvazaŭ en Japanio. Kaj tiel evidentiĝis, kiun koloron havas la kato. Antaŭ jaroj Teng Hsiao Ping - disputante kun la iama prezidanto Mao Zedong, kiu estis konvinkita pri la graveco de la klasbatalo - diris, ke la funkciigado de ekonomiaj organizaj rezultoj en kapitalismo estas bona ankaŭ por Ĉinio, se ĝi akcelas la evoluon de la lando. Teng diris jene: "Tutegale, ĉu la kato estas blanka aŭ nigra. Gravas nur, ke ĝi kaptu muson. "

Finalo en Mongolio

Post mia programo en Ĉinio mi revenis al Eŭropo tra dezerto Gobio kaj Mongolio. La trajno transpasis la limon noktomeze. La loĝantaro de Mongolio estas enorme maldensa - oni povas vojaĝi centojn da kilometroj sen vidi homon. En urboj, kun plurdek mil loĝantoj, oni ofte vidas rajdantojn.

Alveninte en Ulan Bator mi tuj iris al la buroo de Aeroflot en la strato Stalin por konfirmi mian flugbileton. En la stacidomo ne estis taksioj, fine min kunveturigis per sia propra aŭtomobilo mongola familio. Tamen post duonhora vana atendado (neniu estis en la ĝiĉeto) mi prefere iris ekhavi tranoktejon. En Ulan Bator funkcias

kvin hoteloj, mi ricevis ĉambron sufiĉe malmultekoste (84 tugriko = ĉ. 340 Hungaraj forintoj).

Post la tropika varmo estis sufiĉe malagrabla la mongola vintro. Malgraŭ la frosto mi iris sekvatage promenadi tra la urbo. Mi devis iradi plurajn kilometrojn ĝis trovi vendejon. La varsortimento estis malriĉa. Pano, farunaĵo kaj sukero estis ĉie aĉeteblaj, por viando kaj lakto oni devas vicon stari. Fruktoj praktike nenie estis aĉeteblaj. Ĉe iu stratangulo mi vidis cent metrojn longan vicon, ĉiu homo kroĉis siajn manojn al la zono de la antaŭa por ke ne povu iu senrajte enigi. Ili atendis por vodko. Estis longaj vicoj ankaŭ ĉe la frizisto.

Reirinte en la hotelon mi renkontis mian malnovan hungaran konaton, laborantan delonge en Mongolio. Laŭ lia konsilo poste mi iris vidi la dinosaŭron en la Centra Ŝtata Muzeo. Mi vizitis la lamaejon en la jurtokvartalo. 60-70 lamaoj ripetadis la malnovegan monotonan tekston. Laste mi volis eniri Bogdogegen-on, palacon de la lasta teokratia reĝanto, sed ĝi estis malfermita. Do, tiel sen vizito al la fama loko mi iris al la aerodromo kaj reflugis al Europo.



LA MALFERMIĜANTA ĈINIO

NOVAJ EBLOJ POR ORIENTA-OKCIDENTA KUNLABORO

Laŭ invito de la Sciencista-Teknikista Esperanto Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj la aŭtoro pasigis unu monaton en Pekino kaj sud-orienta Ĉinio. Jene li priskribas siajn spertojn el la vidpunkto de ekonomikisto.

.....

La Malproksim-Orienta defio

En mia antaŭa artikolo "Ĉu la miraklo imiteblas?" (Fokuso 88/1) mi traktis la eksterordinare rapidan evoluon de la Japana ekonomio. Tamen Japanio ne estas la sola lando de Malproksim-Oriento, kiu atingis mirindajn ekonomiajn sukcesojn. Kvar aliaj spuras ĝin: Hongkongo, Singapuro, Sud-Koreio kaj Tajvano (Okcidente oni lastatempe nomas ilin "la kvar tigroj", kaj en la Malproksim-Oriento - "la kvar drakoj"). Laŭ multaj ekonomikistoj la salta evoluo de la Malproksim-Orientaj landoj kondukas al tio, ke la "pezocentro" de la monda komerco laŭgrade ŝoviĝos de Atlantiko al Pacifiko. En la lastaj jaroj ankaŭ Ĉinio pli kaj pli aliĝas al tiu procezo.

La evoluon de iu ajn lando premias interalie ĝia intensa partopreno en la tutmonda scienc-teknika kunlaboro. Ne hazarde do plioftiĝis en Ĉinio la internaciaj sciencaj aranĝoj, kiuj donas pli kaj pli da novaj impulsoj por la modernigo de la lando. Inter tiuj elstaras la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (IAKSTE), celanta helpi, ke "*Ĉinio malfermu la fenestrojn al la mondo, kaj la mondo malfermu la fenestrojn al Ĉinio*". Tiujn vortojn mi citas el la parolo de la Ĉina vic-ministro pri telekomunikado, farita dum la inaŭguro de la 2-a IAKSTE. Tiun konferencon, okazintan en Pekino inter la 10a kaj 16a de aŭgusto 1988, partoprenis pli ol 1200 fakuloj el 20 landoj.

La scienca konferenco

La strebo malfermiĝi al la mondo, la deziro lerni kaj sincere kunlabori karakterizas Ĉinion en la 1980-aj jaroj. La portreto de Maŭ

Zedong, iam nomita "La Granda Stiristo" ankoraŭ videblas sur la Tjan-anmen-pordego en la centro de Pekino, sed la Maŭ Zedong-a izoliĝo jam tute finiĝis.

Laŭ la opinio de la Ĉinaj kolegoj la hororoj de la "kultura revolucio" neniam ripetitĝos. Tamen ĝiaj sekvoj eĉ hodiaŭ forte sentebblas. Dum la "kultura revolucio" la supera edukado ĉesis, la universitataj iustruistoj devis transloĝiĝi al la kamparo kaj plenumi tie fizikan laboron. Praktike maleblis kontakti kun alilandanoj. Tial ne nur postrestis la scienco kaj tekniko de la lando, sed ankaŭ ne akumuliĝis spertoj pri rilatoj kun eksterlandaj fakuloj. Tio evidente malhelpis ankaŭ la organizadon de IAKSTE. La partoprenantoj malŝparis multe da tempo pro aranĝado de vojaĝ-aferoj (ekzemple, tuta semajno ne sufiĉis al la organizantoj por validigi mian trajnbileton por la reveturo, kaj finfine mi aranĝis la aferon en la stacidomo kun granda malfacilaĵo) kaj pro komunikad-problemoj (interalie, mi ne trovis publikan telefon-aparaton en la tuta ĉefurbo).

Malgraŭ ĉiuj organizaj malagrabloj la 2a IAKSTE alportis gravajn sukcesojn kaj el scienca kaj el movada vidpunktoj. La organizantoj ricevis amason da preleg-proponoj kaj manuskriptoj en Esperanto. La organiza komitato de la konferenco meritas grandajn laŭdojn pro la fakto, ke la prezentitaj prelegoj estis informriĉaj kaj por la eksterlandaj kaj por la ĉinaj fakuloj. (19 el tiuj prelegoj aperis en la periodaĵo Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj n-ro 1988/3-4. Laŭ la enkondukaj vortoj de ĝia ĉefredaktoro, d-ro Shen Chenru, en la sekvantaj numeroj legeblas pliaj tekstoj elektitaj el la centoj da referaĵoj.)

La ĉeftemo de la nuna IAKSTE estis: "La reciproka efiko de la scienco-tekniko kaj socio". Krom la ĝeneralaj kunsidoj multaj referaĵoj estis pridiskutataj en la ses sekcioj de la konferenco: (1) matematiko, fiziko, kemio, astronomio, (2) tersciencoj, (3) teknikaj sciencoj, (4) medicino, biologio, (5) ekonomio, komerco, kaj (6) lingvistiko, edukado.

En la sekcio pri ekonomio aparte grandan interesiĝon vekis la prelego de Bai Jingchen, esploristo de la Monda Ekonomi-Politika Instituto

sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, pri la novaj tendencoj de la reformado en Sovetunio kaj la Orient-Eŭropaj landoj.

En la terscienca sekcio ĝeneralan kaj samtempe profundan trarigardon de la temo prezentis Gu Gongxu, prezidanto de la Ĉina Geofizika Asocio kaj honora prezidanto de la Geofizika Instituto sub la Ŝtata Sismologia Buroo. Lia prelego titoliĝis "Trovej pruvojn en terkrusta profundo por la tera scienco".

Saĝe decidis la organiza komitato, ke profesoro Christer Kiselman (Svedio) faru sian prelegon ne en sekcio, sed dum ĝenerala kunsido. Tiamaniere ĉiuj konferencanoj konatiĝis kun liaj pensovekaj tezoj pri la signifo de matematiko en la homa kulturo.

La kunsido de la medicina sekcio pruviĝis grava oportuno por kompari sciencajn atingojn de fakuloj el diversaj kulturoj kaj kontinentoj. La Eŭropaj kuracistoj informis pri siaj hodiaŭaj kuracmetodoj, dum Ĉina kuracisto konatigis la ĉeestantojn kun tradicia medicina praktiko baziĝanta sur la Tibeta mistikismo.

Kian koloron havas la kato?

Specialistoj pri Ĉinio bone memoras la tempon, kiam centmilionoj da homoj okupis la demando: "Kian koloron havas la kato?" Nome, prezidanto Maŭ Zedong akuzis siajn pragmatajn politikajn oponentojn - unuavice Deng Ŝjaŭping -, ke ili iras la kapitalisman vojon, klopodante revivigi en Ĉinio la merkaton, la financan stimuladon de la laboruloj kaj aliajn metodojn, pruvintajn siajn taŭgecon por pliefikigi la ekonomion tra la mondo.

"Egalas, ĉu la kato estas blanka aŭ nigra" - respondis Deng Ŝjaŭping. - *"Gravas, ke ĝi kaptu la muson."* Provizore venkis prezidanto Maŭ, asertante la plian gravecon de la klasbatalo. Tamen, vizitante Ĉinion, ĉiu ajn konvikiĝas, ke la definitiva venkinto iĝis Deng Ŝjaŭping: ĉie floras la komerco, abunde prosperas privataj vendejetoj kaj restoracietoj, viglas grandaj bazaroj, kreskas gigantaj konstruaĵoj.

Tiu ĉi fenomeno eĉ pli frapas la okulojn de la vojaĝanto en sudorienta Ĉinio. Laŭ iniciato de Deng Ŝjaŭping oni aparte kuraĝigas

establi komunajn entreprenojn de Ĉinaj kaj eksterlandaj firmaoj, krome oni ebligis pli liberan cirkuladon de kapitalo kaj laborforto. Importante funkciantan kapitalon kaj adaptante evoluintajn eksterlandajn teknologiojn, ĉi tie la Ĉinoj rapide modernigas sian ekonomion. Mi povis persone konatiĝi kun ĉio ĉi: post la konferenco mi vizitis tiun regionon, akceptinte la afablan inviton de la Kantona Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio (STEA) kaj de Fang Huiping, profesoro de la Universitato Ĵinan.

La malfermitecon de Ĉinio bone karakterizas la fakto, ke hodiaŭ eksterlandanoj rajtas libere loĝi ĉe Ĉinaj amikoj kaj kolegoj. Utiligante tiun eblon, en Kantono mi tranoktadis en la loĝejo de d-ro Ke Shi De, katedrestro pri scienca esplorado ĉe la Universitato Ĵinan. (En la komforta loĝejo, konsistanta el tri ĉambroj, kuirejo kaj banejo li vivas kun edzino kaj filino.)

Vojoj al la pinto de la Fuĵi-monto

Sude de Kantono, ĉe la limo kun Hongkongo situas la speciala ekonomia distrikto de Ŝenĝeno. Por eniri tiun ĉi zonon eĉ Ĉinoj bezonas apartan permesilon. Min akompanis unu el la gvidantoj de la Kantona STEA, Liu Wei Zhang, kaj en la stacidomo de Ŝenĝeno nin atendis unu el la estroj de la Entrepreno por Evoluigi la Ŝenĝenan Specialan Ekonomian Distrikton, Du Shou He, kaj la direktoro de la firmao Espero Enterprises, Lee Teck Shiu, ku tiumatene alveturis el Hongkongo.

Alveninte el la interno de Ĉinio, oni sentas sin kvazaŭ en alia mondo. Antaŭ kelkaj jaroj mi studis en Japana universitato, kaj nun ŝajnis al mi kvazaŭ mi denove estus en Japanio. La varoj en la vendejoj pli abundas kaj la salajroj pli altas ol en aliaj regionoj de Ĉinio. Kiel mi tamen konstatis, la diferenco montriĝas ne nur en la vivnivelo, sed ankaŭ en la pensmaniero de la tieaj loĝantoj.

Tion ekzemplas ankaŭ la ekonomiaj kaj politikaj grupoj, ligitaj al la supre menciita entrepreno por la evoluigo de la Ŝenĝena distrikto. Ili kapablas krei prosperan modernan ekonomion sur la loko de la antaŭa mizera kamparana vivo. La entrepreno jam produktas kaj

eksportas altkvalitajn varojn de la nutraĵa, tekstila, kemia, alumina, maŝina kaj elektronika industrioj. La entuziasmaj gvidantoj de la entrepreno, prezidanto Yuan Tao Ren kaj ĉef-inĝeniero Du Shou He faras ĉion eblan por plilarĝigi kaj plifirmigi reciprokan ekonomian kunlaboron kun alilandaj entreprenoj ankaŭ helpe de Esperanto.

Rigardante la ĉielskrapantojn de tiu speciala ekonomia diskrikto, ŝajnis al mi, ke la optimismo de ĝiaj loĝantoj havas realan fundamenton. Sekvante "la kvar tigrojn", ankaŭ tiu ĉi lando, la hejmo de kvinono de la homaro, transformiĝos en evoluintan industriaran socion. La tiucelaj metodoj en Ĉinio parte diferencas de tiuj aplikataj en la nove industriiĝintaj etaj landoj. Ili malsamas ankaŭ en Japanio, en Eŭropo kaj la ceteraj mondopartoj. Tamen la celoj samas. Laŭ Japana proverbo: "Multaj vojoj kondukas al la pinto de la Fuĵi-monto, sed ĝi havas nur unu pinton."



世界语用于经贸领域

《焦点》1988年第3期上刊登了高·马尔库什博士的一篇非常有趣的文章，题为《东西方合作的新的可能性》（第52~55页），谈的是他访问中国深圳特区发展公司的事。其中写道：热情的公司经理袁陶仁、总工程师杜寿河正尽一切努力通过世界语扩大和加强同其他国家企业的相互经济合作。

然而，截至目前为止，我还没看到有一本世界语杂志刊登有关为实现这一目标所作的活动计划。其原因何在？

我不是这方面的专家，但我认为应该尝试一下。因为公司对世界语的理想从来不感兴趣。下面就是我对这种活动方案的一些粗略设想：

(1) 按照国家和经济部门的情况，对有世界语者在那里工作的企业和公司进行登记。这些世界语者有能力在职业上用世界语处理各种关系。

(2) 把这个定期进行登记的公司、企业

名单散发给各公司、企业。建议他们为公司职员举办世界语速成班。

(3) 当然，这些教员应该得到报酬，但他们必须是能胜任这项工作的。其中一点就是他们十分熟悉与公司和企业有关的最新术语，而不是仅仅关注属于俱乐部活动范围的基础教学。

(4) 应该照顾从事这项编辑工作小组，使他们能随意使用计算机。在它开始工作时，它要定期同国际世协的新术语中心进行联系。因为世界语术语在一些领域里还不够完善。

(5) 人们还可以预期出版一本有这些公司通讯处的“贸易——工业年鉴”。这笔费用可用他们的广告费来顶替。

如果我不是在夸夸其谈的话，那么谁去努力实现它呢？

戈·皮尔劳特（比利时）

1989年1月22日

（晓安译）



Dua parto
POST TRIDEK JAROJ



ALVENO AL VJETNAMIO

En 2012 nur mi partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Hanojo el Hungario kaj pro tio mi pensis, ke estus interese raporti pri la okazaĵoj al la membroj de Hungaria Esperanto Asocio. Mi supozis, ke tiel la interesiĝantoj povas imagi la vivon en tiu fora angulo de la mondo. La kongreso komenciĝis sabate, sed laŭ mia plano mi pasigis unu semajnon en tiu interesa urbo antaŭ la kongreso kaj alian semajnon post la kongreso. Post trisemajna restado en Vjetnamio mi pluvojaĝis al Ĉinio, al la bordo de rivero Jangce. La venonta raportserio pri mia orientazia vojaĝo aperis en la reĵurnalo de la Hungaria Esperanto Asocio kaj poste ankaŭ en la reta informilo de la Hungaria Tutlanda Fremdlingva Biblioteko. En la venontaj ĉapitroj de ĉi tiu libro tiu raportserio estas publikigita.

.....

Mi elvojaĝis el Budapeŝto lunde je la 11-a horo antaŭtagmeze kaj alvenis al Hanojo je la 8:00 la sekvan matenon. La vetero ĉi tie en Vjetnamio estis tre agrabla, nek tro varma, nek tro malvarma. La temperaturo estis 26 °C gradoj kiam la aviadilo surteriĝis. (Kiam antaŭ tri monatoj en aprilo mi estis en urbo Bangkok, foje-foje estis ankaŭ 38 °C gradoj).

Pro iu mistera kaŭzo nia aviadilo ŝanĝis sian originalan vojon. Laŭplane ni devintus flugi tra Moskvo-Kazaĥio-Ĉinio, super la regiono Hsinĉiang-Ujgur ĉirkaŭflugante norden la montaron Himalajo kaj alvenante tra Kunming al Vjetnamio. Sed ie post Samarkand kaj Buhara la aviadilo ŝanĝis la veturvojon kaj veturis subite suden. Tiel Himalajon ni ĉirkaŭflugis sude kaj tra Pakistano, Bharato kaj Bengalio (Bangla Desh) alvenis al Fora-Hindio.

Dum miaj vojaĝoj mi ŝatas vivi kiel ordinaraj homoj vivas sian kutiman vivon. *“If you are in Rome, do as the Romans do.”* (Se vi estas en urbo Roma, faru kion la romaj loĝantoj faras.) - diras britoj. Tial mi planis veturi per publika buso de la flughaveno al la urbocentro, ĉar hejme en Budapeŝto mi faris same kaj mi supozis ke ankaŭ la lokaj hanojanoj uzas tiun veturilon plejofte. La kaŭzo estis ne nur por ŝpari monon, sed mi opiniis, ke:

- Se mi veturus per klimatizita buso rapide kaj loĝus en kvinstela luksa hotelo, tiukaze mi vidus nenion el la ĉiutaga vivo de lokuloj. Sed mi venis ĉi tien ĉefe por sperti la normalan vivon de la vjetnamaj homoj.
- Krom tio mi havas sufiĉe da tempo, ĉar mia aviadilo alvenis matene je la oka kaj duono kaj la hotelĉambbron mi povos okupi nur je la dua posttagmeze.
- Alia vidpunkto estis, ke ankaŭ por havi sanan vivo mi pensis, ke mi bezonas almenaŭ tiom da moviĝo. Antaŭ du jaroj mi portadis 50-kilogramajn cementajn sakojn dum konstruado de mia plej nova domo. Pro tio nun estus granda regreso, se mi kapablus porti kelkajn 20-30 kg-ajn valizojn nur per aŭto de unu loko al la alia.
- Kaj ankaŭ tio estas grave, ke mi preferas eviti taksiistojn se eblas kaj en Hungario kaj en aliaj landoj. Dum mia vivo jam plurfoje okazis, ke malgraŭ la fiksjaj prezoj, malgraŭ la mezurilo ili postulis pli da mono je la fino. Nun ĉi tie ne temis pri tio, ĉar ĉifoje temis nur pri vere signifikaj sumoj.



Starante en la flughaveno mi ankoraŭ ne supozis, ke mia al kutimiĝo al la vivostilo de la lokuloj baldaŭ sukcesos eĉ tro perfekte. Mi ĉirkaŭrigadis en la atendejo de la flughaveno kaj rimarkis eŭropan virinon surhavinte t-ĉemizon kun la sama emblemo, kiun kutime surhavas la membroj de niaj esperanto-kluboj. Tial mi demandis ŝin, ĉu ŝi venis ankaŭ al la universala kongreso. Mi eksciis, ke ŝi estis belga esperantistino kaj ankaŭ ŝi pensadis ĝuste pri la sama afero, kiel atingi sian hotelon el la flughaveno.

Mi diris al ŝi, ke mi pensis pri la sama afero kaj tuj demandis la flughavenan informejon kie oni povis atingi la haltejon de la lokaj busoj. Mi demandis kaj poste mi ricevis nekredeblan respondon. Oni diris, ke ne ekzistas lokaj busoj proksime al la flughaveno, sed ĉe ili nun eblas mendi favorpreze taksion, kiu portos nin al la hotelo nur por 30 dolaroj. Sed mi ne povis demandi plu, ĉar ankaŭ la belga virino daŭrigis demandi kaj pro tio la informistino ne plu atentis min.

Tial mi forlasis la virinon kaj iris al alia informejo. Tie estis skribita, same kiel en multaj urboj de la mondo, ke eblas ricevi senpagan turistan mapon. Mi petis unu, sed ne ricevis. La informistino diris, ke la mapoj ĵus elĉerpiĝis kaj proponis ke mi iru per taksio kaj la taksiisto ne bezonos mapon. Ŝi konfirmis, ke ne estis publika aŭtobusa servo inter Hanojo kaj la flughaveno. Tiam mi diris al ŝi, ke mi sciis, ke eĉ du busoj iras al la urbo, la 7-a kaj la 17-a. Estis tiel, ĉar jam hejme mi elprintis la mapon el la reto pri Hanojo, do mi petis ŝin signi la finhaltejojn de tiuj busoj almenaŭ sur mia mapo. Post tio ŝi eblis fari nenion alian, ŝi desegnis la haltejon de la buso 17 proksime al mia hotelo kaj konfesis, ke la prezo ne estis 30 dolaroj, sed nur kvarondolaro, ĝuste 25 cendoj.

Do, mi iris antaŭ la flughavenon, kie atendadis miloj da taksioj, kies ŝoforoj alkuris al mi. Ili ofertis porti min al la hotelo. Ili eĉ montris, ke estis skribite fiksa prezo por la servo, tio estis 16 dolaroj. Kiam mi diris al ili, ke mi volis iri per buso 17, ili tuj volis konvinki min, ke la bushaltejo estas tre malproksime. Ŝajne ili tre surpriziĝis kiam ili eksciis de mi, ke la bushaltejo ne estas malproksime, mi jam eĉ vidis la busojn la alian flankon de la larĝa strato inter la flughaveno kaj la busfinhaltejo.

Antaŭ enbusiĝo mi pensis, ke estus bona ideo ŝanĝi iom da mono al vjetnama dongo por pagi la vojaĝkostojn kaj aĉeti ion por la unuaj tagoj. Unue mi planis ŝanĝi nur 10 eŭrojn al vjetnama dongo kaj petis la monŝanĝiston, ke ŝi donu al mi la monon nur en 20.000-aj monbiletoj. Ĉar mi sciis, ke unu dolaro valoras ĉ. 20.000 dongojn kaj la plej multaj aĵoj (unu tag- kaj vespermanĝo, kilogramo da frukto, 1,5-litra botelo da kolao, ktp) kutime kostas tiom. La multe pli malgrandajn kaj la tro grandajn monpecojn mi malfacile povus uzi. Ekzistas kaj 500-donga kaj 500.000-donga monbiletoj, sed se mi devas subite pagi ion, mi konfiziĝas pro la multaj nuloj. Se mi ne bone atentos, facile mi donos dekoble malpli aŭ pli da mono anstataŭ la reala prezo (Tio eĉ okazis jam unu horon poste en la unua tago.)

Post la monŝanĝo, mi iris kiel aliaj ordinaraĵoj homoj piede al la haltejo de la buso 17. Ĉiuj vjetnamoj surpriziĝis kiam mi eniris la buson, ĉar ili kutime vidis, ke eksterlandanoj iras ĉien per taksio kaj vere mi estis la sola alilanda homo en tiu buso. Mi pagis 25 centojn, kaj dum la unuhora veturo mi rigardis agrable kiel pasigs la vivon la ordinaraĵoj homoj, kion mi certe ne vidus tiom detale tra la fenestro de taksio.



Post unu horo ni alvenis al la urbocentro kie kaj min kaj ĉiun alian eliranton atakis multaj taksiistoj. Ili ofertis porti nin al niaj loĝejoj aŭ hoteloj. Ankaŭ al mi venis unu el ili kaj diris, ke li portos min al la hotelo por 40 mil dongoj (2 dolaroj) kun miaj kvar pakaĵoj. Ĉar mi jam estis sperta pri eventualaj miskomprenoj en similaj kazoj (ĉefe se estas multegaj divervaloraj monbiletoj en uzo), tial mi prenis el mia poŝo du pecojn da dudekmilaj monbiletoj kaj montrante al li, ni ambaŭ konsentis, ke ni parolis pri la sama sumo.

Tiun prezon ankaŭ la aliaj ĉirkaŭantaj taksiistoj trovis ĵusta, pro tio mi pensis, ke tio estas la reala prezo (kvankam en la flughaveno estis skribite la duono de tio por unu kilometro). Do, ni ekiris al la takσιο de la viro. Sed baldaŭ estiĝis surprizo por mi, kiam evidentiĝis, ke la alkurantaj homoj ne havis takσιοjn. Ili havis nur specialajn motorciklojn, kiuj laŭ nia koncepto estis nur etmotoraj mopedoj. En Bangkok mi jam vidis multajn similajn motorciklojn, tie ili estis kutimaj veturiloj. Mi vidis, ke kelkfoje eĉ triope oni sidis sur unu maŝino, sed dufoje mi vidis eĉ kvar homojn (du plenkreskulojn kaj du infanojn) veturi sur tiu eta mopedo. Vojaĝi tiel en Eŭropo estas strikte malpermesita.

Je la komenco mi eĉ ne povis imagi kiel la ŝoforo sukcesos transporti min kun mia granda valizo kune kun mia dekkilograma libropakaĵo, mia portebla komputilo kaj mia alia malpi granda pakaĵo sur tiu eta motorciklo. Laŭ mia plej granda surprizo tamen ni sukcese instaligiĝis kun la pakaĵoj sur la vetruileto kaj post kelkaj minutoj ni baldaŭ alvenis al la hotelo en la centro de la malnova urbocentro. Mi rimarkis, ke ankaŭ la hotelistoj iom surpriziĝis vidinte min alveninte tiel, ĉar kvankam la lokuloj uzas kutime la skoterajn takσιοjn, la eksterlandanoj tamen prefere veturas per ordinaraĵ takσιοj.

Laŭ mi la hotelo estis bona elekto. Ĝi ne estis luksa, sed mi ricevis bonan ĉambron „*superior double room*”. La ĉambro estis pura, komforta, en ĝi troviĝis granda dupersona lito, ŝrankoj, tablo, foteloj, klimatizilo, plasma televidilo, fridujo kaj senlima senkrompaga retuzo. Eĉ ĉio funkciis, ankaŭ la elektran adaptilon mi povis facile meti en la kontaktilojn. Tio nek en Japanio, nek en Usono kutime sukcesas, nek en Nordafriko, malgraŭ la fakto, ke la tensio ankaŭ tie

estas 230 V. La tieaj kontaktiloj kaj ŝtopiloj havas alian normon. Ankaŭ la banĉambro estis pura, en ĝi troveblas kanaletara akvotralava necesejo, duŝejo, mantuko, sapo, ŝampuo, sterila dentobroso, ktp.

Ĉio ĉi kostis nur 12 dolarojn po nokto, do, iom mapli ol 10 eŭrojn. Simila ĉambro kostas pli ol 80 eŭrojn laŭ la Dua Bulteno de la kongresaj dokumentoj, se oni mendas la ĉambrom tra la kongresa servo. (Ĉefe, se ni konsiderus, se mi loĝus duope en la ĉambro, tiukaze la kosto estus nur 5 eŭroj po kapo.) Kiam mi alvenis al la hotelo, tiam ĉe la akceptejo oni ĵus manĝis ekzotikajn fruktojn. Ili tuj donis kelkajn pecojn ankaŭ por mi el tiuj fruktoj kiuj angle nomiĝas „*leeches*”.

Koncize: anstataŭ tridek dolaroj mi pagis nur iom pli ol du dolaroj por veturkosto inter la flughaveno kaj la urbocentro, tamen mi alvenis sukcese al mia hotelo kun kvar grandaj pakaĵoj. Pensante pri tio mi trankviliĝis kaj iris promeni al la proksimo. Ne for de la hotelo mi vidis multajn restoraciojn, kaj en unu el ili mi manĝis kruste rostitan porkidaĵon kun rizo laŭ hindoĉina maniero. La manĝaĵo enhavis ankaŭ ovon, krakrostitan cepon kaj grandan porcion da kukuma salado. Laŭ loka kutimo la tagmanĝo kostis unu eŭron. Mi supozis, ke ĉiuj manĝoj ĉi tie kostis ĉ. unu eŭron, ĉar en la najbara tajlanda ĉefurbo mi pagis same por simila tagmanĝo aŭ vespermanĝo.

Interese, same kiel en Bangkok, ankaŭ ĉi tie venis al la restoracio almozetanta budhista monaĥo signalante per sonorileto sian alvenon por akcepti la kutimajn donacojn. Ankaŭ mi prenis mian monujon por meti iom da mono al lia skatolo, sed malbonŝance mi donis nur dekonon kion mi intencis, ĉar en la unua tago mi ankoraŭ ne bone orientiĝis pri la banknotoj kun la multaj nuloj.

Promenante en la strato de la hotelo mi vidis, ke la vivo ankaŭ ĉi tie pasas laŭ kutima orienteca maniero. Homoj kaj veturiloj svarmas meze de la strato sur la ŝoseo, komercistoj prezentas iliajn varojn same tie, kuiristoj kuiras strate kaj metiistoj marteladas sidante sur la trotuaro. La pacan idilion interrompis subita kriaĉado kaj kurpelado

de motorciklisto en la mallarĝaj stratoj. La evento okazis tiom subite, ke mi nur kelkajn minutojn poste provis diveni kio okazis. Mi supozas, ke eble iu ŝtelis motorciklon starantan funkciante, aŭ iu ŝtelis varon sur la strato per motorciklo. Mi vidis, ke baldaŭ la tuta stratularo persekutis la ŝteliston. Tio estis por mi bona averto en miaj unuaj horoj en Hanojo. Tiam mi decidis zorge atenti pri ŝtelado en la venontaj tri semajnoj.

Post tio mi aĉetis la plej bezonatajn aĵojn por mia tropika vivo: kvinlitran botelon da trinkakvo kaj kilogramon da tropika frukto, grandan sakon da „leechee”, ambaŭ por 30 mil dongoj. Mi jam komencas al kutimiĝi, ke la prezoj ne estas skribitaj kaj antaŭ la aĉeto unue oni diras terure altajn prezojn. Kiam la komercistoj vidas, ke por tiaj prezoj mi ne emas aĉeti, poste ili postkuras min por oferti la varojn eĉ por la duono. Ili ŝatus, ke mi aĉetu ion, se mi jam estas tie.



Bushaltejo antaŭ la flughaveno de Hanojo. Ne estas benkoj, seĝoj, la vojaĝantoj atendas la busojn sidante sur betonblokoj.

VOJAĜIMPRESOJ EN URBO HANOJO

La duan tagon post mia alveno al Hanojo la urbo ricevis musonan pluvon kaj tial ĉiuj homoj en la stratoj survestis tutkorpan plastan pluvmantelon. Sed mi ne surhavis tiaĵon, ĉar mi tute ne ŝatas tutkorpan stufadon de kolo ĝis maleolo en la humida tropika vetero. La pluvo ne estis malagrabla, ne tia, kia en Hungario printempe aŭ aŭtune, sub kiu oni povas malvarmumi. Ĉi tie kaj la aero kaj la pluvo havis proksiman temperaturon al la homa korpo. Tial promeni en pluvo estas tia sento kia estas duŝo en tre varma vetero en strando por refreŝiĝi. Al hanojanoj ŝajne plaĉis tiu plasta envolvado, ĉar eĉ la etaj infanoj estas ŝovitaj sub la pluvmantelon de la gepatroj veturante sur motorciklo. Tiam nek la buŝo nek la okuloj de la infanoj estis videblaj, mi ne povis imagi kiel ili povis spiri sub la pluvmantelo kaŝite sur la motorciklo en la mallumo.

Kiam mi povis iom pli bone ĉirkaŭrigardi en la proksimo de la hotelo, tiam pli kaj pli aperis la ĉiutagaj fenomenoj de la tria mondo. Tio signifas, ke nenio funkcias, surstrate multaj homoj almozpetas monon, ktp. Kvankam en la konfirmo pri hotelrezervo estis skribite inkluziva kontinenta matenmanĝo en la prezo, surloke ili ne volis kompreni pri kio temas, kiam mi demandis pri tio. Ankaŭ tio estis skribita tie, ke eblis mendi pli riĉan britan matenmanĝon por krompago de 1.40 eŭroj kaj kompletan anglan matenmanĝon por 2 eŭroj. Sed pagi tion estus tute sence, ĉar multe malpli koste eblis ricevi kompletan tagmanĝon aŭ vespermanĝon en la proksimaj etaj manĝejoj de frumateno ĝis malfrua vespero.

Kiam matene je la sepa kaj duono mi iris al la teretaĝon, tiam mi trovis fermitan pordon kaj estis neniu en la akceptejo. La deĵoristo certe iris en apudan ĉambron por dormi, malgraŭ la hejmpaĝo de la hotelo, kiu anoncis 24-horan funkciadon de la akceptejo. Tiu hotelo funkciis ankaŭ kiel vojaĝoficejo, same kiel la plej multaj hoteloj en Hanojo, do ili vendis ekskursajn pakaĵojn kaj trajno- kaj aviadilbiletojn. En la interreto estis skribite de antaŭa gasto, ke en tiu hotelo estis vendita kvar-dolara trajnbileto por 28 dolaroj. Kaj la angle

apenaŭ parolanta oficisto diris al mi, ke al urbo Wuhan, kien mi volis vojaĝi post la kongreso, ili tute ne povis vendi bileton. Anstataŭ tio li proponis ke mi aĉetu trajnbileton por 70 dolaroj ĉe ili al urbo Nanning ĉe la alia flanko de la landlimo en Ĉinio, kaj tie mi aĉetu alian bileton al Wuhan.

La hotelo funkcias kiel familia entrepreno, la personaro ne ŝajnis esti tre helpema. Kiam mi diris, ke la pilo en la teleregilo de la klimatizilo elĉerpiĝis, ili nur malvolonte metis alian uzitan pilon en la teleregilon, kiu simile apenaŭ funkcias. En tiu strato estis atingeblaj multaj senpagaj interretkonektoj. Kiam mi demandis en la akceptejo, ĉu al kiu mi konektiĝu, ili proponis ke mi aliĝu al alia nekonata hotelo. Ĉar tiu tre lame funkcias, pro tio mi provis aliĝi al la reto de mia propra hotelo. Tio estis bona decido, ĉar per tio ekde tiam mi povis senerare kaj pli rapide retumi, ol en Hungario.

Kvankam la klimatizilo funkcias normale nek per la ŝanĝita pilo, mi tamen ne volis reiri al la akceptejo kaj plendi denove. Mi supozis, ke ili travivus tion kiel ĝeno. Pro tio mi simple lasis la aparaton enŝaltita post kiam la dekan aŭ la dek kvinan fojon sukcesis enŝalti ĝin. De tiam, se la aero estis tro malvarma prefere mi malfermis la fenestron por iom da tempo ol malŝalti la klimatizilon riskante ne plu sukcesi enŝalti denove kiam tio estus bezonate.

Kvankam la vojaĝa oficisto en la hotelo proponis, ke mi aĉetu ĉe ili la bileton por 70 dolaroj ĝis Nanning, mi pensis, ke mi devus iri ankaŭ al la stacidomo kaj demandi tie, kiom kostus tiuj biletoj. La hoteloficisto tion tute malrekomendis, dirante, ke la stacidomo estis tro malproksime, eĉ sur la mapo ne troveblis. Antaŭ ol serĉi la stacidomon mi decidis demandi oficiston de la najbara hotelo pri la eblecoj. Tiu homo estis multe pli afabla, li rigardis kelkajn aferojn en la reto kaj post kelkaj telefonvokoj diris, ke tamen eblis aĉeti trajnbiletojn al Wuhan. Nur iom multekoste, ĉ. 330 dolarojn. Tial li rigardis ankaŭ la aviadilan prezon, ĉu tiu estus malpli kosta. Bedaŭrinde videblis, ke ankaŭ tiu estus tre kosta, ĉar eblis atingi urbon Wuhan nur tra Sanghaj. Do, pro tio mi devus ĉirkaŭveturi la duonon de la mondo.

Sur la stratoj miloj da vendistoj ofertis la plej diversajn aĵojn, sed plej ofte oni diris nekompreneble altajn prezojn kaj nenie estis skribite la la prezoj de la varoj. Eble ili havis aliajn prezojn por la lokaj loĝantoj. Foje okazis, ke fruktovendistino volis vendi surstrate unu kilogramon da frukto (leechee) por 100 mil dongoj. Kiam ŝi vidis, ke mi ne emis pagi tiom multe, ŝi tuj malaltigis la prezon al 50 mil postkurante min tra metroj por persvadi min.

En la najbara Tajlando la prezoj de fruktoj estis malpli kostaj. Mi rememoras, ke tie mi kutime aĉetis 3-4-kilograman akvomelonon por 1 eŭro, ĉi tie por kilogramo estis 1 dolaro. Tio estis duoblo de la hungariaj prezoj. Ankaŭ duriano estis sufiĉe multekosta, 60 mil dongoj estis la prezo por ĉ. 15-dekagrama senŝeligita frukto, tio estus ĉ. 15-20 dolaroj po kilogramo. Sed nek vicon de aĉetantoj mi vidis ĉe tiu frukto en Vjetnamio. En Bangkok la durian-vendistoj de mateno ĝis malfrua vespero senĉese distranĉadis la homkape grandajn fruktojn, ĉar tiom longvice atendis antaŭ ili la eĉetantoj. La prezo de dolĉa mango kaj banano estis sama ĉi tie kiel en Tajlando, sed la bananoj ĉi tie havis eble pli bonan guston. Dolĉan mangoon mi ankoraŭ ne vidis en Eŭropo ĝis nun, laŭ mi tiu frukto eble ne eltenus la longan transporton, tial ĝin eblis trovi nur ĉi tie en la tropikoj.

Dum la promeno surstrate foje mi vidis virinon, kiu poris grandegan korbon sur sia kapo en la musona pluvo. La fenomeno estis tre interesa, ĉar la korbo estis 7-8-oble pli granda ol ŝia kapo. Kiam ŝi rimarkis, ke mi longe rigardas tiun interesan fenomenon, ŝi mansvingis, ke mi fotu ŝin. Mi pensis, ke ŝi poste volus ricevi monon pro la pozado kaj pro tio mi nefotis ŝin. Ĉiukaze estis interese vidi la korbon tute ne moviĝantan dum ŝi ne tuŝis ĝin mane kaj vigle zigzagante inter la aŭtoj en la stratoj sen trotuaro. (La plej ofte parkantaj motorcikloj okupis la trotuarojn, do ili ne estis uzeblaj piediri.) Poste ŝi volis trudvendi al mi ankaŭ platan pluvmantelon, sed mi ne akceptis ĝin, ĉar mi ne volis esti kovrita per plasto de kolo ĝis maleolo en tiu tropika varmo.

Promenante al la stacidomo multaj homoj venis al mi por purigi mian ŝuon, kvankam mi ne surhavis ŝuojn. El 100 homoj 95 ne uzas

fermitajn ŝuojn en la tropikoj, la plej multaj havas nur pantoflojn, aŭ rimensandalojn. Ankaŭ mi portis nur tiajn sandalojn kun du rimenoj. Iu juna viro eĉ sur tiu rimarkis ion riparendan. Li klarigis al mi per viglaj gestoj, ke unu el la bendoj loziĝis kaj jam prenis la tujgluilon por ripari ĝin. Apenaŭ mi sukcesis forpeli lin, ĉar mi sciis, ke tiuj riparoj ofte multe pli kostas ol hejme aĉeti novan ŝuon en nia budapeŝta superbazaro.

En la najbara stratangulo ĉ. kvardekjara virino venis al mi. Ŝi diris, ke ŝi okupiĝis pri la aferoj de la Ruĝa Kruco kaj ŝi kolektis donacojn por tiu noblcela organizo. Mi prenis mian monujon por oferti kelkmil dongojn por tiu grava celo. Tiam ankaŭ la virino prenis kajeron por noti la nomojn de la donacintoj kaj la sumojn. Ŝi malfermis la kajeron, kaj mi vidis, ke unu el la donacintoj donis duon milionojn da dongoj laŭ la noto en la kajero, aliaj eble eĉ pli. Tial mi tuj remetis mian monujon en mian poŝon kaj diris, ke mi miskomprenis la situacion. Mi pensis, ke temis nur pri kutima donackolektado.

Ankaŭ la virino remetis la kajeron kaj komencis diri, ke eblis donaci ankaŭ malpli grandajn sumojn, sed mi rapide pluiris al la stacidomo. La virino ankoraŭ iom sekvis min dirante daŭre, ke mi donu al ŝi almenaŭ iom. Mi tamen donis neniom, ĉar mi ne volis honti pro la eta kelkmildonga donaco por tiu nobla celo dum mi sciis, ke aliaj helpis per duonmilionoj aŭ eĉ pli por kontribui al al solvo de gravaj sociaj taskoj. Tiuj nekutime grandaj donacopetoj estas sufiĉe kutimaj en la tria mondo. La plej interesan kazon rakontis al mi mia nederlanda konatino. Ŝi ricevis helpopetan leteron el Afriko. La nekonata petinto skribis, ke li aŭdis, ke eŭropanoj subtenis la afrikanojn kaj li petis aŭton kaj eĉ menciis la konkretan produktojaron, modelnomon kaj tipon, kiun li volis ricevi.

En la stacidomo akceptis min similaj triamondaj cirkonstancoj. (Sed se ni pensas pri la multnombraj senhejmuloj en la stacidomoj de Budapeŝto, ni povas konkludi, ke nek en Hungario estas pli bona la situacio.) Kvankam mi jam estis dum mia vivo en multaj stacidomoj, ĉi tie en Hanojo mi vidis por la unua fojo, ke la trajnhoraro ne estis skribita laŭ la kutima maniero en aliaj partoj de la mondo, do laŭ la

vico de la ekiro de la trajnoj. Anstataŭ ĝi en Hanojo estis apartaj listoj pri diversaj linioj. Tiel povis okazi, ke ekiranta trajno antaŭtagmeze je la 10-a aperis sur la informilo post trajno kiu ekiris je la kvara kaj duono posttagmeze.

Ekzistis ankaŭ internaciaj trajnoj, ekzemple kiuj portis pasaĝerojn al la ĉina urbo Nanning. La problemo estis, ke la finhaltejo de la trajno (Nanning) ne estis skribita en la horaro, nur la landlimurbo en la vjetnama flanko. Tiuj vilaĝoj estis nekonataj nomoj por multaj vojaĝantoj. Nek internacia kaso, nek informejo funkciis en la stacidomo. Ĉe la enirejo sidis junulino sub informa tabulo, sed ŝi estis okupita pri sia komputilo. Ŝi tute ne okupiĝis kun vojaĝantoj kaj ŝi tute ne parolis eŭropajn lingvojn.

Kiam mi skribis sur paperon simplan demandon, ĉu ŝi sciis kie oni vendas bileton de Hanoj al Wuhan, ŝi nur kapneis, montrante ke ŝi ne sciis. Laŭ ŝi en la stacidomo oni vendis nenian bileton al Wuhan. En la stacidomo neniu parolis alian lingvon krom la vjetnama. Parte pro tio, parte pro malsimila bona sperto en la bangkoka ĉefstacidomo mi konstatis, ke la tajlanda ĉefurbo estis multe pli amikeca, pli bone funkcia kaj por eksterlandanoj pli malfermita urbo ol Hanojo.



Poste mi decidis, ke mi promenas iomete en la proksimo, ĉar en la stacidomo eblis organizi nenion. Antaŭ tio mi tralegis la prezojn de la trajnbiletoj kaj vidis, ke la bileto al Sajgon kostis 1,9 milionoj da dongoj. Mi pensis, ke tio estus pli ol 900 dolaroj, kaj pensis, ke en tiu kazo la 300 dolara bileto al Wuhan ne estus tro alta. Nur post horoj mi konsciis, parolante kun vjetnamaj studentoj ĉe lagobordo, ke mi eraris pri la nuloj ĉe la milionaj ciferoj kaj la prezo de la bileto estis nur 100 dolaroj.

Ekirinte de la stacidomo al la urbocentro mi ekvidis grandegajn verdajn tabulojn pendigite ambaŭflanke de la strato en vjetnama kaj internacilingva surskriboj: „Esperanto estas ponto de paco, amikeco kaj disvolviĝo.” Ŝajnas, ke la urbo jam prepariĝas al la akcepto de la kongresaj gastoj. Sed en tiu tago mi ankoraŭ ne iris al la kongresejo. Mi iris al la lago Hoan Kiem, ĉar mi sciis, ke tie estas multaj malmultekostaj restoracioj kie tutan tagon oni povas manĝi freŝajn varmajn manĝaĵojn. En loko mi vidis grandan stakon da ĵusfritita gratenita viando, krustkrake rostitan porkoripaĵon, frititan hakviandobulon kun diversaj legomoj kaj safrana rizo. La manĝaĵo estis envolvite en verda tropika folio. Mi eksidis kaj mendis grandan porcion. En tiuj lokoj la gastoj mem montras el la granda elekto kiuj tri-kvar manĝaĵoj estu metotaj sur la pladon apud la rizo. La manĝo estis tre bongusta kaj kostis entute nur 50 mil dongojn.

Por mi, eŭropano estis iom nekutima vidi, ke kokinoj promenis ĉirkaŭ ni ĉe la restoraciaj tabloj en la centro de la vjetnama ĉefurbo. Tie mi ne trovis eĉ unu bestobredejon, aŭ ajnan ĝardenon taŭgan por bestobredado en la eŭropa senco. Estis mistere kie dormas tiuj bestoj nokte apud la pluretaĝaj senĝardenaj domoj kaj kial ne trafas ilin tiu granda inundo de motorcikloj kaj aŭtoj sur la stratoj de Hanojo. La kokinoj estis tre amikaj, amikeca koko eĉ saltis sur la seĝon apud mi dum mi tagmanĝis.

Post la riĉa kaj abunda tagmanĝo mi ekiris al la lago Hoan Kiem. Sed antaŭ tio mi haltis iom ĉe plenŝtopita vojkruciĝo ĉe ruĝe lumanta ruĝa kruco. Mi supozis, ke tiu montris, ke iu medicina centro devus esti proksime. Baldaŭ la ruĝa lumo malaperis kaj la lumo verdiĝis.

Tiel elvidentiĝis, ke la ruĝa kruco en la vojkruciĝo en Hanojo signifas ruĝan lumon por piedirantoj. Do tio montras, ke ili ne rajtas trairi la ŝoseon. Post kiam la lumo verdiĝis ankaŭ mi pluiris al la fama lago pri kiu estis nomita la urbocentro.

Tute apud la lago estis grandega banko, en kiu mi trovis pli bonan kurzon por ŝanĝi eŭrojn al dongoj ol ĉe la flughaveno, aŭ en la banko apud mia hotelo. Mi ankaŭ tie diris al la kasistino, ke ŝi donu nur dudekmil dongajn monbiletojn, ĉar la pli valorajn monbiletojn mi ne povas bone uzi. En Vjetnamio la plej malgranda monbileto valoras 500 dongojn, sed ankaŭ ekzistas monbiletoj por 1.000, 2.000, 5.000, 10.000, 20.000, 50.000, 100.000, 200.000 kaj 500.000 dongoj. Tiom da diversaj koloraj kaj valoraj monbiletoj konfuzas la homojn. Alilandaj vojaĝantoj je la komenco dum pluraj minutoj ne povas klare vidi, kiom valoras la mono en la manoj. La kasistino diris, ke ne estis en la kaso tiom da 20-milaj pecoj, kiom mi bezonus, do parton mi tamen ricevis en 50.000 donga valoro.



Parkantaj motorcikloj sur la trotuaro

Tuj post tiu banko mi rimarkis alian vojaĝoficejon en stratangulo. Ankaŭ tien mi iris por demandi ĉu ili vendis trajnbileton al Wuhan. La oficisto ekaŭdinte tiun surprizan demandon respondis, ke la demando estis tro komplika, li promesis konsultiĝi kun la ĉefoj kaj petis, ke la venontan tagon mi revenu por la respondo. Sed tion li malkaŝis, ke li povus vendi busbileton por 35 dolaroj al la ĉina urbo Nanning (vjetname Nam Ninh). Kvankam tio ne estis tro pozitiva respondo, sed mi jam ĝojis, ke la vojaĝbiletoj daŭre estas malpli kaj malpli kostaj.

La lago estis tre bela kaj ĝin ĉirkaŭis agrabla parko kun belaj ĉiamverdaj plantoj, simile al la urba parko en Budapeŝto. Ĉar la tuta ĉirkaŭaĵo tre plaĉis al mi kaj ankaŭ la vetero estis agrabla, mi ĉirkaŭpromenis ĝin dum unu kaj duon horo. Poste mi eksidis sur benkon. En kelkaj minutoj venis al mi tri 19-20-jaraj studentinoj. Laŭ miaj antaŭaj spertoj mi timis, ke ankaŭ ili volus ricevi monon de mi per iu nova ruza truko. Sed post kelkaj minutoj klariĝis, ke ili ne kolektis monon, ili volis nur simple babilu kun eksterlandano por ekzerci lingvojn kaj konatiĝi kun la vivo de homoj en foraj landoj.

Kiam mi diris, ke mi venis el Hungario, videblis, ke ili havis neniun imagon pri tiu lando. Tial mi desegnis sur paperon la mapon de la mondo kaj meze de Eŭropo mi markis la lokon de Hungario sur la mapo. Mi markis ankaŭ la linion de la rivero Danubo. Kiam mi vidis, ke eĉ tio ne helpis, tiam mi desegnis ankaŭ Austrion kaj Germanion supozante, ke ili aŭdis ion almenaŭ pri tiuj grandaj landoj. Unu el la fraŭlinoj respondis, ke ŝi ne komprenis kial mi desegnis Aŭstralion mezen de Eŭropo, ĉar ja ĝi estas ĉirkaŭita de maro.

Post kiam ni klarigis tiun miskomprenon, estis nur klarigenda: kio estas rivero Danubo, kies vjetnoman nomon mi ne povis diri. Mi nur povis diri, ke ĝi nomiĝas germane Donau, hungare Duna, angle Danube, sed pri tiuj informoj ili eĉ pli surpriziĝis. Ili ne komprenis kiel povas havi rivero tiom da nomoj, kaj kie povas esti tiu rivero, tion ili tute ne sciis. (Mi pensas, ke ankaŭ inverse estus same, se mi demandus cent hungarojn ĉu ili scias kiu rivero fluas tra Hanojo, certe nek unu sciis, ke tio estas la Ruĝa rivero.)

Poste ni komencis babili pri bestoj vivantaj en Hungario. Mi parolis pri ĉevaloj, bovinoj, porkoj, kokinoj, ktp., sed ili miris kial tigroj kaj leonoj mankis en la listo. Ili simple ne kredis, ke nek tigroj nek leonoj troviĝis en Hungario, nek en aliaj landoj de Eŭropo. La akiritajn informojn kaj la nekomprenitajn anglajn vortojn ili precize notadis en siajn notlibrojn por hejme ankoraŭfoje trastudi la ricevitajn novajn informojn. Videblis, ke ili serioze interesiĝis pri la vivo de foraj landoj, tial plurfoje redemandis, kiam mi parolis pri nekutimaj aferoj. Ekzemple ili demandis: „*se estas arbaroj en Eŭropo, kial ne estas tigroj en ili?*” Ĉar ili vidis multegajn filmojn en la televido kaj en tiuj filmoj tre ofte videblis tigroj kaj leonoj, tial por ili estis tute nature ke ĉie estas tigroj kaj leonoj en la mondo.

Intertempe finiĝis la instruhoroj en la proksimaj lernejoj kaj venis al ni babili pli kaj pli da studentoj. Tiel ni fariĝis baldaŭ la centro de la societa vivo ĉe la lago.. Utiligante la eblon nun ankaŭ mi demandis kelkajn aferojn, kiujn dum jaroj mi ne povis kompreni pri la vivo de orientaziaj homoj. Kiel tie vivas la averaĝaj homoj? Kiom grandaj estas la salajroj? Kiuj estas la ĉiutagaj manĝoj?, ktp. Statistikojn pri tio eblis trovi multloke kaj pri la prezoj ankaŭ mi havis proprajn spertojn en la bazaro, sed mi supozis, ke tiuj ne estis realaj spertoj, ĉar supozeble por eksterlandanoj ĉio pli kostas en Sudorienta Azio.



Lago Hoan Kiem en urbocentro de Hanojo

Tiu supozo estis reala. Post pluraj monatoj mi eksciis, ke tiun frukton, kiun mi plej bone ŝatas en Hindoĉinio oni nomas angle ne „jackfruit”, sed „durian” (hungare cibetgyümölcs), kaj tiu 60 mil dongoj por 150 gramoj da senŝeligita frukto estis tute nereala. Iu studento rakontis, ke en lia hejmvilaĝo tuta homkapo-granda frukto kostis ĉ. 30 mil dongoj. Ankaŭ tion mi eksciis, ke la malpli granda malmolŝela frukto, kiun mi ricevis en mia hotelo vere nomiĝis „leechee” kaj ties prezo ankaŭ laŭ la studentoj estis 40-50 mil dongoj.

Laŭ la studentoj la averaĝa salajro en Vjetnamio estis ĉ. 500 dolaroj monate kaj unu el ili rakontis, ke post lia finstudo li esperis ricevi 300 dolarojn monate kiel komenca salajro. El tiuj ciferoj kaj el la prezoj por mi evidentiĝis, ke el tiu vidpunkto Hungario staris pli proksime al Vjetnamio ol al Aŭstrio. Mi eksciis, ke en Vjetnamio loĝis 90 milionoj da homoj kaj la ĉefurbo havis 7 milionojn da loĝantoj.

Poste ni parolis pri prezoj de hoteloj. Mi diris, ke mi pagis 10 eŭrojn po nokto en mia eta hotelo, sed en hotelo Melia kie okazos la kongreso 117 eŭrojn kostas ĉambro. Aŭdinte tion mia apuda studentino ne volis kredi al siaj oreloj. Ŝi kalkulis, ke el tiu mono ŝi kutime vivus dum dudek monatoj. Konante la manĝoprezojn tion mi ne povis kredi. Kiam ankaŭ aliaj studentoj aliĝis al la babilado iu rimarkis, ke tiuj multaj nuloj en la vjetnama mono ankaŭ la vjetnaman fraŭlinon konfuzis. Oni rekalkulis kaj konkludis, ke ŝi vere ne dudek monatojn, sed nur du monatojn povus vivi el tiu sumo, kion oni pagas por unu ĉambro en hotelo Melia por unu nokto.

Jen, do, ankaŭ por vjetnamoj la kalkulado kun miliona magnitudo ne estas tre facila. Post tio la fraŭlinoj parolis ankaŭ pri similaj temoj, do, kiom da milionoj elspezas familioj monate, ktp. Aliaj fraŭlinoj menciis, ke estis familioj, kiuj elspezis eĉ unu trilionon, sed ĉu vere temis pri triliono aŭ eble miliardo, kaj ĉu por monate aŭ jare, tion mi jam ne kuraĝis demandi. Ĉar estus bezonata alia papero kaj multe da tempo por diveni kiom da nuloj estis en tiuj ciferoj.

Vidinte la grandan babilgrupon fine grizhara maljunulo venis al ni.

La studentoj laŭ tradicia orienta kutimo tuj ekstaris apud mi por lasi lin sidi tuj apud min. Li verŝajne pro la influo de la franca koloniada tempo en sia juneco france lernis en la lernejo, ĉar li komencis paroli al mi en la franca. Kaj la studentoj kaj li estis tre afablaj, sed mi jam ege antaŭlonge lernis france en la mezlernejo kaj la plej multjn vortojn mi jam forgesis. Tial li plejofte demandis min en franca lingvo kaj mi respondis angle, sed estis studento kiu eĉ japane diris kelkajn frazojn, ĉar li studis ĝuste la japanan kiel fremdan lingvon en sia lernejo. En tiu babelka kaoso daŭriĝis nia babilo ĝis malfrua vespero kaj jam lumis la aŭtolampoj kiam mi alvenis hejmen al la hotelo. En la stuparejo de la hotelo akceptis min nekutima sceno, lacerto grimpis sur la muro apud la pordo de mia ĉambro. Mi volis foti tiun interesan okazon, sed la lacerto pensis aliel. Kiam ĝi ekvidis, ke mi prepariĝas foti, ĝi fulmrapide kuris sur la vertikala muro al la plafonon. Poste mi bone fermis la pordon kaj la fenestrojn, ĉar mi ne volis renkonti nokte lacertojn apud mi en mia lito.



UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La kongreso en Hanojo estis tre grandioza kaj solena. Multaj programoj okazis unu post la alia kaj pro tio en la unua tago mi povis alveni al mia hotelo nur vespere je la 10-a horo. Mi antaŭvidis, ke la programoj estos tiom riĉaj kaj plenaj, ke en la venontaj tagoj mi revenos nur noktomeze. Je la komenco oni informis min, ke la organizantoj esperos mian tre akvivan partoprenon dum la venonta semajno.

850 partoprenantoj alvenis al la kongreso el sesdek landoj. La lokaj organizantoj planis la eventon tre altprestiĝa, la vicŝtatprezidanto estis la alta protektanto. Ĉar mi kutimas havi tre simplan vivmanieron kaj vivostilon, pro tio iom ĝenis min la plej luksa hotelo de Hanojo kiel kongresejo, kie la prezoj estis dudekoble pli altaj ol la lokaj prezoj. Sed ankaŭ la prezo de ĉambro estis dekoble pli alta ol la prezo, kion mi pagis por mia hotelĉambro. Tamen kio plej multe ĝenis min, estis alia afero. Unutaga enirbileto estis nepageble alta sumo por ordinaraĵ vjetnamoj. Se ordinara hanojano volus veni por unu tago scivoleme rigardi kio okazas dum la kongreso, tiam li devus pagi 1.200.000 dongojn por unutaga vizito. Per tiu mono mi povas pagi mian trisemajnajn manĝojn.

Alia surprizo estis, ke dum la registrado mi ricevis strikte personan invitilon bele ornamitan en kiu la ĉefurbestro invitis min al solena akcepto. Oni skribis en la invitilo ke necesas vestiĝi dece kaj konvene al tiu okazo. La problemo estis, ke mi tute ne estis preparita al tia okazo, do mi kunportis nek ŝtrumpojn, nek festan kompletan kun jako. Tiutipajn aĵojn averaĝa vojaĝanto neniam kunportas al la tropikoj. Pro tio mi konkludis, ke dum la venontaj tagoj mi devos serĉadi dum horoj iun konvenan veston, kio ne estos facila tasko, ĉar vjetnamoj estas multe pli malaltaj kaj malgrandaj ol mi.

La unuan tagon vespere inter la 7-9-a horo mi ricevis eblon por prezenti la plej novan eldonon de mia libro, kiu jam multe vendiĝis. Kvankam mi ne povis vendi ĉion dum tiuj du horoj, sed la preskostoĵ jam ankaŭ tiel revenis, ĉar mi sukcesis trovi malmultekostan presejon

por presi la librojn. Tiel ni povas diri, ke la eldono de tiuj libroj ankaŭ laŭ komerca vidpunkto estis sukcesa. Pro tio mi sincere dankas al Baksa József, la estro de la Szegeda Esperanto Rondo, ĉar lia ideo estis, ke ni eldoni la librojn.

Ankoraŭ du problemetoj estiĝis koncerne de la librovendado. La unua okazis tuj ĉe la unua vendo. Japano volis aĉeti la libron kaj li diris, ke li povis pagi en vjetnamaj dongoj. La prezo estis 80 mil dongoj. Li transdonis al mi kvindek milan bankbileton kaj demandis ĉu tio sufiĉis. Mi diris ne, ĉar 80,000.- estis la prezo. Tiam li donis ankoraŭ unu similan bankbileton al mi. Kiam mi volis redoni 20 mil dongojn al li, tiam mi rimarkis, ke lia 50-mila bileto havis alian koloron ol la mia. Mi rigardis pli bone la bankbiletojn kaj rimarkis, ke lia estis 500-mila bileto, do vere li pagis unu milionon da dongoj. Tion nek mi, nek li rimarkis. Pro tio mi devis ĉirkaŭkuri la hotelon por ŝanĝi tiujn neuzeble grandajn monbiletojn.



Granda palaco ĉe lago Hoan Kiem

Alia problemo okazis vespere ĉirkaŭ la naŭa, kiam mi finis la librovendadon. Tiam mi havis tiom da enoj, dolaroj, eŭroj kaj eĉ ĉinaj juanoj en la poŝo, ke fine mia monujo tute pleniĝis. Pro tio mi decidis meti ĉiujn variajn buntkolorajn monbiletojn en diversajn plastajn sakojn.

La organizantoj atentigis min, ke la venontan tagon mi salutos la partoprenantojn de la kongreso solene en la nomo de hungaraj esperantistoj laŭ la rajtiga letero de Szabó Imre, prezidanto de Hungaria Esperanto Asocio. Do, mi salutos la partoprenantojn kaj dankos la bonrezultan laboron de la Loka Kongresa Komitato. Poste, en la Internacia Kongresa Universitato mi prelegos pri miaj spertoj rilate al la supera ŝtata aŭditorado. La titolo de mia prelego estos demando: „*Kiuj kontrolas la registarojn de la mondo?*” En tiu prelego mi trarigardos koncize la tri uzitajn kontrolsistemojn en nia mondo. Temas pri la mediterana modelo kie tribunalo havas tiun agadon kaj pri la skandinava registara kontola modelo kie ŝtatoficejo sub la ĉefministro plenumas tiun taskon. Kaj fine mi parolos pri la „Westminster modelo” kie oficejoj sub la parlamentejoj havas tiun agadon en la anglosaksa mondo.

Profesoro Lee Jungkee, prezidanto de la Seula Esperanto Kulturcentro rimarkis, ke mia nomo estis inter la prelegantoj de la kongresa universitato. Tial li petis, ke mi parolu koncize ankaŭ en la ŭonbulisma fakkunsido pri miaj spertoj en fororientaj monaĥejoj. Akceptante tiun peton mi prelegos ankaŭ pri tio kun titolo „*Interna harmonio kaj ekstera paco*”. En tiu prelego mi trarigardos la budhistajn meditajn ekzercojn kaj iliajn fiziologiajn, moralajn kaj sociajn efikojn. Ĉar laŭ profesoro Lee tiu temo povas esti interesa ankaŭ por la partoprenantoj de la medita trejnado en korea urbo Iksan, li petis ke mi prelegu pri tio ankaŭ en Koreio. Mi akceptis ankaŭ tiun proponon kaj decidis vojaĝi denove al Koreio la venontan januaron por paroli pri tiu temo pli detale.

Komence de la kongresa programo okazos prelegoj en salono Haszpra pri la kultura, politika, ekonomia kaj socia situacio de Vjetnamio, la akceptanta lando. Estis ŝoke por mi legi la nomon de

salono Haszpra. Li estis fama profesoro de la Budapeŝta Teknika Universitato kaj membro de multaj sciencaj akademioj. Pasintjare aŭtune li ankoraŭ prelegis en nia nacia kongreso en urbo Szolnok kaj ni ankoraŭ apenaŭ alkutimiĝis al la realo, ke li ne plu estas inter ni. Li mortis nelonge antaŭ la kongreso.

La prelegoj pri la gastiganta lando antaŭvideblis interesaj, ankaŭ mi eksciis nur el la enkondukaj informoj, ke la vjetnama kaj la hungara ŝtatoj fondiĝis proksimume samtempe. La unua vjetnama reĝo fondis urbon Hanojo dudek jarojn post la kronado de Sankta Stefano, la unua hungara reĝo.

Post kelkajn tagojn okazos la akcepto de la ĉefurbestro, espereble ĝis tiam mi sukcesos trovi iun konvenan veston en la proksimaj vendejoj. Tiuj estos miaj plej gravaj fakaj programoj dum la kongreso kaj laŭ la programhoraro kaj laŭ la riĉaj programoj verŝajne mi neniam povos enlitiĝi antaŭ noktomezo en la venontaj tagoj de la semajno.



Gaja babilado ĉe la bordo de lago Hoan Kiem.

LA GRIZA PAPAGO

La solena inaŭguro okazis antaŭtagmeze je la 10-a de la kongreso. Tiu evento okazis ne en la kongresejo, en kvinstela luksa hotelo, ĉar tie ne estintus tiom granda salono por akcepti 850 homojn. Tial ĉiuj ĉeestantoj estis transportitaj al la Universitato de Teknologio kaj Ceteraj Sciencoj, en kies centra halo la vicŝtatprezidanto faris sian solenan salutparolon. Poste estis transdonita la Ordeno pri Amikeco al la prezidanto de Universala Esperanto Asocio (mallonge: UEA). La vicŝtatprezidanto transdonis la ordenon, tiamaniere rekonante la meritplenan agadon de UEA pri la establigo de vjetnama sendependeco kaj profundigo de internacia paco kaj amikeco.

La Komitato de UEA kunsidis la 28-an de julio kaj elektis profesoron doktoron Nanovfszky György, eksprezidanton de nia Hungaria Esperanto Asocio honora membro. La inaŭgura kunveno akceptis kun granda aplaŭdo la anoncon, post kiam la ĉefsekretario legis la decidon pri tio kaj legis koncizan vivokuron de la nova Honora Membro. Mi tuj informis la estraron de nia asocio pri tiu grava honorigo kaj persone gratulis al nia antaŭa prezidanto por ricevo de honora membreco de UEA.

Alia hungar-rilata evento estis la prelego de Rudita Hey Rudecek titolite „*Tibor, la semanto*” pri la vivo de Székely Tibor, fama hungara esperantista mondvojaĝanto kaj verkisto de multaj sukcesaj libroj. La preleganto prezentis ankaŭ videofilmojn pri li.

Dum la unua tago de la kongreso antaŭtagmeze mi havis oficialan taskon saluti la kongreson en la nomo de Hungaria Esperanto Asocio kaj poste ankaŭ dum la inaŭguro de la Internacia Kongresa Universitato mi estis petita resume paroli mia vendreda prelego. La rektoro de la universitato ĉijare estis Gotoo Hiroshi, lingvista profesoro de la fama nord-japana Universitato Sendai.

Ekde mi sukcesis vendi relative multe da ekzempleroj el mia plej nova libro, okazis al mi interesaj kabaredo-scenaj eventoj. Ĉiuj kongresanoj nomis min sinjoro profesoro, kvankam mi skribis nenion pri tio en mia libro, ke mi estus profesoro en ajna universitato. Fakte

pli frue mi instruis matematikon en la budapeŝta ekonomikoscienca universitato kaj prelegis en diversaj ĉinaj, japanaj, skandinavaj, ktp. universitatoj, sed tio jam finiĝis, ĉar mi emeritiĝis antaŭ pluraj jaroj. La situacio ŝajnis sufiĉe komika, tio memorigis min al kabaredoskeĉo „Sas”, konata hungara kabaredisto. Laŭ tio homo eniras birdovendejon kaj demandas:

- *Kiom kostas tiu bela flava papago en la montrofenestro?*
- *200 pengojn.*
- *Tio estas tro multe al mi. Kaj ĉu tiu pli pala birdo, kies kelkaj plumoj mankas?*
- *Ĝi estas nur 100 pengoj.*
- *Por mi ankaŭ tio estas multekosta. Kaj ĉu tiu sensignifa, griza papago en la angulo?*
- *Ĝi kostas 1000 pengojn.*
- *Ĉu 1000 pengoj? Kion tiu birdo kapablas fari?*
- *Tion mi ne scias. Mi nur scias, ke la aliaj birdoj nomas ĝin Sinjoro Prezidento.*



VOJAĜEBLECOJ AL LA SANKTA LANDO

La esperanto-movado havas altan prestiĝon en Vjetnamio. Tion montras la fakto, ke la vicprezidanto de Vjetnamio, Nguyen Thi Doan persone ĉeestis en la kongresa inaŭguro. En sia salutparolo li menciis, ke Ho Shi Min, la fondinto de la respubliko, aŭ kiel la ŝtatvicprezidanto nomis lin „*la estimata oĉjo Ho*” estis la unua esperantisto en tiu ĉi lando. Inter la jaroj 1913-1917 li havis rilatojn kun la esperanto-movado, kiam li loĝis en Britio. Ho Shi Min uzis esperanton ankaŭ en sia revolucia agado kaj kuraĝigis la fondon de Vjetnama Pacdefenda Esperanto Asocio, kiu estis la antaŭorganizo de la nuna Vjetnama Esperanto Asocio.

La kongreso havis tre riĉan programon, tuj en la unua tago la partoprenantoj povis elekti inter multaj diversaj kulturaj prelegoj kaj la partoprenantoj povis aliĝi al la diskuto de la subaj demandoj:

1. *Superrigardo de la eŭropaj kaj aziaj kulturoj kaj problemoj de esperantigo de aziaj nomoj.*
2. *Kion oni povas fari por kaj per esperanto?*
3. *La rolo de esperanto en RIO+20, la konferenco de UNO pri daŭrigebla evoluo.*
4. *Esperanto kaj AEGEE, la plej grava eŭropa interfaka internacia studenta organizo.*
5. *Esperanto kaj maŝintradukado (rilate al la fakto, ke la internacia lingvo estiĝis la 64-a altradukebla lingvo de Google)*
6. *UN, UNESCO*
7. *Reta informado pri la eventoj en Azio.*

Kadre de la lasta progamo profesoro Lee Jung Kee, estro de la Seula Esperanto Kultura Centro traktis tre gravan temon. Li analizis, kiel li povis krei sukcesan kulturan centron, en kiu ekde la fondiĝo en 1991 li organizis 248 esperanto-lingvokursojn en la korea ĉefurbo. Tiu organizo laŭ aĝo, sukceso kaj rezultoj estas simila al la budapeŝta Kultura Esperanto Asocio fondita kaj funkciigata de Szilvási László.

Ili estas similaj, ĉar la hungara asocio estas simile sukcesa kaj preskaŭ samteme estis fondita utiligante la novajn eblecojn okaze de la orienteŭropaj reĝimŝanĝoj.

Krom la menciitaj programoj okazis en tiu tago ankaŭ la prezento de la gajnintoj de la belarta konkurso kaj okazigo de ekumena diservo en la hanoja protestanta preĝejo.

Krom tiuj gravaj programoj mi estis okupita ankaŭ pri aliaj ĉiutagaj zorgoj tute nekompreneblaj por eŭropanoj. Ĉar mi ne antaŭsupozis, ke mi devos ĉeesti multajn oficialajn renkontojn, mi kunportis neniujn konvenajn elegantajn vestaĵojn kaj ŝuojn. Ĉar mi jam plurfoje estis en similaj lokoj, mi sciis, ke averaĝaj homoj en la tropikaj landoj neniam surhavas tiutipajn vestaĵojn kaj elegantajn fermitajn ŝuojn. Tial promenante tra la stratoj inter la hotelo kaj la kongresejo mi scivoleme rigardis la piedojn de plurmil homoj kaj rigardis kiom da homoj surhavas ŝtrumpojn. La rezulto estis kiel supozite, el cent homoj ĉirkaŭ cent promenis senŝtrumpe kaj simile al mi aŭ pantoflo aŭ rimena sandalo estis sur la piedoj.



Mi rigardis ĉiujn vestaĵo- kaj ŝuovendejojn, sed en neniu el ili oni vendis ŝtrumpojn, plejofte ili eĉ ne komprenis kion mi volis aĉeti. Kiam mi ie trovis angle parolantan vendiston, mi skribigis kun li sur paperon kiel diri ŝtrumpon en la vjetnama lingvo por almenaŭ montri en la venontaj vizitotaj vendejoj kion mi serĉas.

Fine apud kvinstela hotelo mi trovis pucan, luksan vendejon faritan por bezonoj de eksterlandanoj, kie estis ankaŭ ŝtrumpoj. Tie estis ŝtrumpoj, sed la prezo de tiu rara trezoro estis konvena al sia rareco. Mi jam ne memoras ĉu temis pri pli ol kvaron milionoj aŭ duon milionoj da dongoj. Por preventi ŝteladon en la vendejo estis zorge fiksita elektronika ĉipo por signali ĉe la elirejo. Por mi tamen ne la pinta prezo de la valora ŝtrumpo estis la kaŭzo de la neaĉeto, sed ĝia grandeco, ĉar ĉiuj estis 4-5 cm-ojn malpli granda ol mia piedo. Pro tio mi devis daŭrigi la ŝtrumposerĉadon en la urbo, ĉar por partopreni en la akcepto de la vicĉefurbestro estis strikta postulo, ke oni alvenu elegante kaj konvene al la okazo.



Multetaĝaj domoj en Hanojo

Estis videble granda interesiĝo pri la plej nova eldono de mia libro, tamen mi ne povis vendi kiom estus deziro aĉeti, ĉar UEA, nia internacia organizo tion iom malhelpis. Ili volis ke mi komisiu ilin vendi dum la kongreso kaj tiukaze ili postulis ricevi 30%-an makleraĵon. Mi tion konsentis, sed mi konkludis, ke tamen tio ne sukcesis. Ĉar ja antaŭ kelkaj monatoj ili porponis tion kaj mi tuj respondis jese, sed nenio okazis poste dum multaj monatoj, eĉ respondon al mi letero mi ne ricevis.

Tial la japanaj organizantoj proponis, ke estus pli bone prezenti la japanan eldonon de la libroj en fora-oriento. Agou Takashi, ĉefsekretario de Oomoto Esperanto Populariga Asocio (mallonge: EPA) diris, ke ili celebros la 90-an datrevenon de EPA venontjare, kaj proponis, ke mi partoprenu en tiu solena evento. Tiu solena festo okazos en venontan junion en Kameoka. Tio estas eta ĉarma japana urbeto proksime de Kyoto, la iama imperiestra ĉefurbo.

Kvankam por mi estus plej simple vojaĝi al Japanio en januaro kiam mi partoprenos en la oka internacia medita renkonto, nun mi tamen konvinkiĝis, ke mi revenu al la Lando de la Leviĝanta Suno nur en junio. Origine mi planis vojaĝi al Japanio el Koreio, ĉar mi bone sciis, ke oni povus tre komforte iri el Busan al Osaka per ŝipo Pansar Dream. Dum mia lasta vojaĝo mi spertis, ke en la ŝipo oni ricevas tre bongustajn vespermanĝojn kaj matenmanĝojn kaj ankaŭ okazas interesaj muzikaj programoj. Sed en januaro en tiuj lokoj kutime estas ankoraŭ malvarme kaj pro tio mi pensis, ke el Koreio mi veturos plu ne al Japanio en januaro, sed revenos el Bangkok, Tajlando kie en tiu sezono estas 25 aŭ 26 °C gradoj. Mi esperis, ke tiel per multe da sunlumo kaj vitaminplenaj freŝaj tropikaj fruktoj mi povos plifortigi mian korpon en la tempo de kutima printempa laceco en Eŭropo.

Do, mi revenos al Japanio nur en junio kiam tie estas sufiĉe varme por agrable promeni en la stratoj, tamen antaŭ la varmega somera pluva sezono nomita „cuju” japane. Cuju kutime komenciĝas nur en julio.

Inter tiuj du eventoj okazos ankaŭ alia tre interesa programo kiun mi nepre volas partopreni, sed pro la intereseco de la programo mi

kredas, ke ankaŭ multaj aliaj interesiĝos pri ĝi. Pri tiu ebleco mi per elektronika letero infromis la estraron de nia Hungaria Esperanto Asocio. En Hanojo mi eksciis, ke inter la 14-a kaj la 18-a de aprilo organizos la Israela Esperanto Asocio la 2013-jaran azian kogreson, kaj lige al ĝi estos organizata du ekskursoj al la subaj vidindaĵoj:

- *Jerusalem (Malnova urdo, monto de Olivarboj kie Jesuo instruis siajn disĉiplojn, la ĝardeno Gecemani, Preĝejo-monto, moskeo El Aksa la tria plej sankta loko de muslimoj, Plormuro, ruinoj de preĝejo de Herodo kiu estis la plej sankta loko de la judaro, Via Dolorosa, la Sankta Tombejo kaj la Israela Muzeo kie estas prezentataj la Mortmaraj ruloj.)*
- *Hajfa (la Bahaa ĝardeno, centro de la bahaa religio, la renovigitaj domoj de la germana kolonio kaj la proksima Akko, la iama krucmilita ĉefurbo.)*
- *Nazaret (loko de infanaĝo de Jesuo, Baziliko de la Anonco, Preĝejo Sankta Johano, puto de Maria, preĝejo Sankta Gabrielo)*
- *Galilea lago (Nacia Parko Arbel, la loko de la Monta Parolo, Kapernaum kaj Tabba kie okazis la mirakla pano- kaj fiŝomultigado kaj vizito al kibuco)*
- *Tel-Aviv*
- *La antikva Jafo*
- *Morta Maro*
- *Jeriko*
- *Masada*
- *Eilat kaj la Ruĝa maro*
- *Petra*

Mi jam en Hanojo decidis ĉeesti tiun interesan kongreson en Israelo kaj ankaŭ verki libron pri tiu vojaĝo en la Sankta Lando. Nepalaj esperantistoj informis min, ke ankaŭ en Nepalo estos organizota unika ekskurso en februaro en la montaro Himalajo sed tien nun mi ne iros. Unue, ĉar mi ne tre havus tempon por tiu vojaĝo kaj due ĉar

mi timas, ke tiam en la Himalajo estos tre malvarme. Mi ne tute komprenas kial ne somere estas organizataj renkontiĝoj en tiuj altaj montaroj.

Kvankam al la Himalajo mi ne iros ĉifoje, tamen al la venonta universala kongreso mi jam aliĝis en la vjetnama ĉefurbo. La kialo estas, ke en Hanojo mi prelegis pri la ŝtata aŭditorado en la kongresa universitato kaj mi pensis, ke en la venonta kongresa universitato estus bone pli detale trakti tiun situacion. Se tiun temon la estraro de la Kongresa Universitato trovos konvena, tiam daŭrigante mian hanojan prelegon mi prelegos venontjare en Reykjaviko pri la eliro el la nuna monda ekonomia krizo kaj klarigos kiujn rolojn povas havi la superaj ŝtataj kontrolaj organizoj en tiu agado.



La Roka Templo sur la pinto de Templomonto en urbo Jerusalemo estas sankta loko por islamanoj kaj ankaŭ por judoj

KOMPLIKAĴOJ PRI ŜTRUMPOAĈETO.

La duan tagon post la inaŭguro same ĝis la 10-11-a vespere daŭris la programoj, kiel okazis antaŭe. Por mi estis malfacile iri hejmen post la vespera kultúra programo, ĉar la filmoj kaj teatraj prezentoj okazis ankaŭ en la universitata konstruaĵo for de la kongresejo. La specialaj busoj luitaj tiucele nur per pluraj fojoj sukcesis transporti la 850 partoprenantojn al hotelo Melia, la kongresejo. Kiu loĝis en alia hotelo kiel mi ekzemple, tiu devis ankoraŭ de tie iri piede al sia hotelo. La duan tagon la ĉefaj eventoj estis la jenaj:

- *Kadre de „aŭtoraj duonhoroj” prezentis siajn plej novajn verkojn Amri Wandel, Stefan MacGill kaj Probal Dasgupta.*
- *Solena akcepto por la Societo Zamenhof*
- *Kunveno de Esperanta Jura Asocio*
- *Kunveno katamantoj senformale babilante antaŭ la libroservo en foteloj*
- *Kadre de la Nacia Vespero estis luditaj specialaj vjetnamaj muzikiloj fare de muzikistoj vestitaj en nacia kostumo kaj ni povis aŭdi ekzotikajn orientajn kantojn, teatrajn scenojn kaj vidi dancojn.*
- *Kelkaj el ni vizitis la Militan Muzeon kie oni rememoris pri japana esperantisto, kiu dum la vjetnama milito flambroligis sin dum la milito proteste kontraŭ la milito.*
- *Estis prezentita esperantlingva vjetnama literatura eldonaĵo kun internacia kunlaboro.*
- *Estis prezentita en la loka gazetaro raportoj pri la inaŭguro de la kongreso kun bildo de la vicprezidento, kiam li transdonis la Ordenon pri Paco al la prezindanto de UEA.*
- *Estis laŭtleĝita mesaĝo de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof en kiu li deziris al la partoprenantoj realigon de la sonĝoj de sia avo. Temas pri la sonĝoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de internacia lingvo Esperanto.*

- *Estis laŭtleĝita salutmesaĝo de Amon Efat, israela ambasadoro, en kiu li invitis la tutmondan esperantistaron al Jerusalemo al la venontjara azia kongreso.*
- *Vespere inter la sepa kaj duono kaj la naŭa okazis grandskala bankedo en unu el la luksaj salonoj de la hotelo por 202 personoj.*

La kongreso inspiris plurajn homojn verki poemojn. Sin Kiro verkis la suban poemon. (Ties realecon nur tiu kapablas plene kompreni, kiu vidas la svarmon de daŭre fluantaj veturiloj en la stratoj de Hanojo.)

*„Trafikiloj, ve, sur vojoj
Traveturas, fi, kun bojoj!
Tra bruego en Hanojo
Trovas sin abunda ĝojo!”*

Eluzante la senprograman tagon en la kongreso, kiam kongresanoj kutime ĉeestis oficie organizitajn ekskursojn, mi provis organizi mian pluvojaĝon el Hanojo al Nanning. Mi vidis, ke estos plej bone resti almenaŭ du noktojn en tiu sud-ĉina urbo antaŭ vojaĝi plu al Wuhan. La kaŭzo estas, ke nur tie mi povos ekscii kiam mi ricevos lokon por trajno aŭ buso. Rezervi sidlokon por tiuj veturiloj ne eblas en Vjetnamio. Sed celo de restado en Nanning estis ankaŭ por rigardi la lokajn vizitindaĵojn de tiu sudĉina urbo kaj gustumi la famajn manĝojn de provinco Guangĉi.

Mi komprenis, ke aĉeti alilandan enlandan trajnbileton aŭ busbileton ĉi tie en Hanojo estis ŝajne malebla, tial mi decidis aĉeti bileton nur ĝis la sudĉina Nanning (vjetname nomata Nam Ninh). Ĉar ĝis nun mi ricevis tute malsamajn prezojn en diversaj vojaĝoficejoj, pro tio mi pensis, ke prefere mi iros al la busstacidomo kaj rigardos la prezojn tie. Temas pri la hanoja busstacidomo, kie aŭtobusoj al Nanning forveturos. Tiel mi povis aranĝi la biletaĉeton tre agrable. Mi ne partoprenis ajnan ekskurson organizitan de UEA konante la azian situacion kaj la prezojn en najbaraj landoj, ĉar mi konstatis ke UEA kalkulis la pluroblon de la kutimaj lokaj prezoj al la partoprenantoj.

Mi promenis al la loko, kie la busstacidomo devis esti laŭ la mapo,

sed mi tute ne surpriziĝis laŭ la spertoj de la pasintaj tagoj, ke tie estis neniu busstacidomo. Eĉ ne estis skribite, ke tie estis finhaltejo de ajna enlanda aŭ internacia buslinio. Krom tio estis neniu instalaĵo, kiel ekzemple atendejo, necesejo, kaso, de kiu oni povus supozi la ĉeeston de stacio. Estis nur iu signo pri ia ebla bushaltejo, ke proksime al tiu loko estis kelkaj parkantaj busoj kun fermitaj pordoj en aparta parkejo.

Estis vid-al-vide al la busoj ankaŭ flugentreprena vojaĝoficejo, do mi eniris por scivole demandi, ĉu ili vendis hazarde ankaŭ busbiletojn krom aviadilbiletoj. Mi havis bonŝancon, ĉar jes, oni vendis kaj eĉ tie mi ricevis la plej malaltan prezon ĝis nun en Hanojo. La vojaĝo kostis nur 540 mil dongoj, ĉ. 20 dolaroj. Tial mi tuj aĉetis la bileton kaj tiel decidiĝis, ke la 8-an de aŭgusto matene mi ekiros el Hanojo kaj alvenos al Nanning je la 4.30 posttagmeze. Mi trovis tiun ĉi manieron por vojaĝi pli bona ol per trajno, ĉar trajno iras nur dufoje semajne kaj ĉifoje nokte. Pro tio mi vidus nenion de la pejzaĝo vojaĝante en trajno kaj nek dormi mi povus. Estus tiel, ĉar verŝajne la landlimgardistoj kaj la doganistoj vekus min meze de la nokto ĉe la vjetnama-ĉina landlimo.



Antaŭ aĉeto de la busbileto mi rete rezervis hotelĉambron por mi en Nanning por du noktoj. Ankaŭ tie mi havis bonŝancon, ĉar mi sukcesis rezervi la lastan malmultekostan ĉambron en bona urbocentra hotelo. Tiu hotelo estis dek minutojn promene de la stacidomo. La klimatizita dupersona ĉambro kun larĝa lito (superior double room) kun banĉambro kaj senpaga interreto kostis 15 dolarojn po nokto. Krom la malalta prezo estis alia avantaĝo, ke bonŝance troveblis multegaj restoracioj kun lokaj specialaĵoj en tiu parto de la urbo, kaj ankaŭ la Popolan parkon oni povis atingi per 15-minuta promeno.

La venontan tagon mi venis al mia hotelo pli frue, ĉar vespere inter la 8-10-a horoj estis granda luksa balo por la partoprenantoj de la kongreso en la plej eleganta hotelo de la urbo. Antaŭ ĝi mi devintus ŝanĝi miajn vestojn al iu pli eleganta. Samtempe en alia salono de la sama hotelo estis granda solena akcepto okaze de la datreveno de ekregado de la maroka reĝo. Grandegaj ruĝaj rultapiŝoj estis metitaj ĉie, kie la gravuloj povis trapasi de la enirejo al la salono de la akcepto. Ĉe la ĉefa enirejo la personalo jam pompe viciĝis por akcepti la gastojn kun respektaj riverencoj, kiam ili eliris el iliaj luksaj aŭtoj. Mi pensis, ke tio tute ne estas mia mondo, kiam mi ekvidis la grandan luksadon kaj decidis prefere reveni al mia modesta hotelo.

Unue mi pensadis dum kelkaj minutoj ĉu mi vestu alian pli konvenan veston kaj reiru rigardi la eventojn, sed la vetero forigis miajn planojn. Survoje al mia hotelo grandega musona pluvo atakis min tiel forte, ke poste mi aspektis kiel zizelo post inundo de sia groto. Ne nur mi, sed ankaŭ mia ĉemizo kaj pantalono, eĉ miaj poŝoj kaj la enaj poŝtuko, monujo, mono, dokumentoj, ktp. estis plene malsekaj. Tial mi ekĝojis fine alveni hejmen, agrable duŝi kaj tute rezigni pri la puca festeno, kvankam intertempe ne plu pluvis.

Por la balo teorie mi jam povintus vestiĝi konvene, ĉar ĉemizon, kravaton, ktp. mi ja kunportis antaŭvidante bezonon, kvankam mi sciis, ke en la tropikoj neniu surhavas tiaĵojn. Eĉ ŝtrumpetojn mi sukcesis aĉeti intertempe malgraŭ la komplika situacio. Mi jam

skribis en la antaŭa ĉapitro, ke mi vizitis almenaŭ dudek vestaĵo- kaj ŝuovendejojn sed mi trovis ŝtrumpojn aŭ ŝtrumpetojn nenie. Pri tio mi tute ne miris, ĉar mi vidis, ke ĉi tie praktike ĉiuj homoj estis vestitaj konvene al la klimato. Ĉiuj vjetnamoj surhavis nur pantoflon aŭ sandalon nature sen ŝtrumpoj. En la plej multaj lokoj oni eĉ ne komprenis kion mi volis, kiam mi parolis al il pri ŝtrumpoj.. Kiam mi fine sukcesis klarigi tion, mi petis la vendiston ke li skribu sur paperon kiel oni diras vorton „ŝtrumpo” vjetname.

Per tiu papero mi iris en la venontan vendejon, kie vendisto ekĝojis vidi la slipon en miaj manoj. Li legis la vjetnaman vorton kaj li kondukis min al la ŝuo-sekcio. Li proponis, ke mi elektu, kion mi volis. Nun mi eksciis, ke la antaŭa vendisto pensis, , ke mi volis aĉeto ŝuojn. Kiam mi montradis al mia piedo inter la haŭto kaj la sandalo, li konkludis, ke mi volis aĉeti ŝuojn. Tio estas tute komprenebla en tiu parto de la mondo. Li tute ne pensis pri ŝtrumpoj, ĉar ili ne estas bezonataj en vjetnama klimato. Pro tio li skribis ne ŝtrumpon, sed ŝuon sur la paperon.

Post tio mi konkludis, ke plej bone estos peti la angle parolantan oficiston en la hotelo por skribi la vorton „*ŝtrumpo*” sur paperon. Mi faris tion kaj poste jam ĉio iris glate. Mi eniris en la plej grandan superbazon proksime al la hotelo kun la papero en la mano. Tie la vjetnamaj komercistoj daŭrigis la babildon inter si kun kutima enuo kaj apatio, sen zorgo al novaj aĉetantoj. Nur unu fruktovendisto demandis kion mi volas, tial mi montris la paperon al li. Li trairis en kaŝitan angulon de la legomvendejo, prenis ŝtrumpojn, montris ke ili kostis 50 mil dongojn. Mi pagis kaj tiel solviĝis la dutaga ŝtrumposerĉa problemo.

Mi tamen decidis, ke malgraŭ la konvenaj ŝtrumpoj, mi ne iros al la akcepto de la ĉefurbestro ĵaŭde. Ĉar neniu sciigis min antaŭ la vojaĝo, ke mi devos partopreni en tiaj elegantaj oficialaj eventoj kaj pro tio mi venis kun vestaĵoj laŭ la lokaj kutimoj. Tio signifas, ke mi havis similajn vestaĵojn, kiujn lokaj homoj havis en la tropikoj surstrate. Nur ĉe la registrado estis al mi enmanigite kupono pri la akcepto kaj buŝe dirite, ke por tiu kupono mi ricevos gravan

personan invitilon de la ĉefdirektoro de la internacia organizo.

Kiam mi hazarde vidis poste la ĉefdirektoron, tiam vere mi ricevis de li la belan invitilon, ornamitan per blazono. Sur ĝi estis skribite ne nur la postulo pri la konvena vestaĵo, sed eksplicite ankaŭ malpermeso de uzo de sandaloj en la akcepto. Ĉar hejme en la kelo de mia domo mi jam havas plenan ŝrankon da ŝuoj dum jaroj neuzitaj, tial mi ne volis aĉeti ankoraŭ unu superfluan paron da fermitaj ŝuoj, kiujn post la akcepto mi neniam surhavis dum mia vivo. Ne parolinte pri pliaj eblaj komplikaĵoj pri kompleto, pri koloro kaj fasono de vestaĵo, ktp. ktp. Tiel do, mi pensis, ke por ĉiuj (sed ĉefe por mi) estos la plej bone, se mi ne iros al tiu akcepto.



Korto de hanoja preĝejo

OĈJO JÁNOS EN LA OSAKA

MONDEKSPOZICIO

En la lastaj dek tagoj en Vjetnamio mi ĉiam havis la senton „*déjà vu*” (jam vidite). Mi tre ofte sentis, ke iam mi jam vidis tion, iam mi jam travivis tiun situacion. Nuntempe en Hungario estas jam natura kutimo ne kunhavi multe da kontanta mono en la poŝo, ĉar en multaj vendejoj, stacidomoj, eĉ ĉe etaj metrostacioj oni povas pagi la fakturojn per bankkarto. Sed tio ankoraŭ ne ĉie kaj ne ĉiam estas tiel.

Kiam en la okdekaj jaroj mi estis en Japanio, mi spertis surprize, ke en tiu lando jam antaŭ tridek jaroj la poŝta ŝparkaso funkciis per magnetbendaj kartoj. En mia lando nur maljunuloj rememoras, ke hungaroj konservis ilian monon en poŝta ŝparlibreto antaŭ multaj jardekoj. Dum tiu tempo poŝtovicistoj registris la daton kaj la enpagitan sumon en la libreton per globkrajono. Samtempe ili skribis la samajn datojn ankaŭ en sliparan kartonon de la poŝtofiĉejo, same per globkrajono por havi pruvilon tie pri la enpago. En tiu sistemo se iu volis elpreni monon el sia ŝparlibreto, li povis fari tion nur en la sama poŝtofiĉejo, kie la ŝparlibreto estis eldonita kaj la kartonslipo deponita.



Tial estis por mi surprizo ĉijare en januaro en la stacidomo de Osaka, kiam mi volis aĉeti trajnbileton per Kintetsu trajna linio al Nagoja. Tie la kasisto ne akceptis eksterlandajn bankkartojn. Li klarigis al mi, ke per karto eblis pagi, sed nur per bankkarto de japanaj bankoj. Tio por mi, eŭropano estis nekutima, ĉar interne en Eŭropo ni povas uzi tiajn bankkartojn praktike en ĉiu lando.

Kompare al Japanio la situacio ĉi tie en Hindaĉinio estis eĉ pli malbona. En la stacidomo de Hanojo ne nur la neakcepto de bankkarto estis problemo, sed praktike ne eblis aĉeti internaciajn trajnbiletojn. La oficistoj diris al mi, ke ne eblis aĉeti trajnbileton al Wuhan kaj proponis, ke mi aĉetu ĝin en Ĉinio. Temas pri la okmiliono granda ĉina urbo. Tio memorigas min al la 70-aj kaj 80-aj jaroj, kiam ankaŭ ĉe ni en Hungario estis simila situacio.

Tiam laŭ budapeŝta ŝerco oĉjo János vivis en hungara urbeto Göd kaj okazis, ke li legis artikolon en gazeto pri la mondekspozicio en japana urbo Osaka. Legante la interesan artikolon li decidis vojaĝi tien por rigardi la ekspozicion. Li iris al sia stacidomo en Göd kaj petis de kasisto bileton al Osaka. Responde la kasisto diris, ke li povis doni bileton nur ĝis Orienta stacidomo de Budapeŝto. Poste li klarigis, ke oĉjo János tie povos aĉeti la pliajn biletojn, kompreneble ne ĝis Japanio, sed unue nur al ekspresa trajno ĝis Moskvo. En Moskvo li povos aĉeti la venontan bileton ĝis Nahodka, tie ŝipbileon al Yokohama kaj fine en tiu japana urbo li povos aĉeti bileton ĝis Osaka.

Oĉjo Janos finfaris la plurmonatan proceson, vizitis la mondekspozicion en Osaka kaj jam ruze antaŭridetis kian mienon montros la kasisto en Osaka, kiam li volos aĉeti bileton reen al Göd. Li demandis do la kasiston:

- *Ĉu vi povus doni al mi trajnbileton ĝis hungara urbeto Göd?*

La japana kasisto redemandis:

- *Al kiu Göd? En urbeto Göd estas tri stacidomoj: Göd Orienta, Göd Centra kaj Göd Okcidenta. Do, bonvolu diri pli precize, ĉu pri kiu stacidomo temas?*

Tio estis nur ŝerco, sed tiutempe mi havis similajn spertojn ankaŭ en la vera vivo, kiam mi volis aĉeti trajnbileton al Tihookeanskaja en la Orienta stacidomo de Budapeŝto. Tie la vendistino laŭte ekridis en la internacia giĉeto kaj diris al mi, ke mi parolis stultaĵon. Ŝi redemandis kion signifis Tihookeanskaja kaj mi respondis, ke ĝi estis stacidomo ĉe la bordo de la Pacifika oceano. (Temas pri rusa stacidomo, finhaltejo de la Transsiberia ekspresa trajno.) Poste ŝi diris, ke tien ne eblis veturi trajne. Laŭ ŝi la Pacifika oceano estis en la alia flanko de Ameriko kaj ĉar ŝi ŝajne ne sciis, ke la terglobo estas globo, pro tio ŝi konkludis, ke ne eblis vojaĝi trajne el Hungario al la marbordo de la Pacifika oceano.

Mi rememoris tiujn eventojn, kiam mi volis aĉeti trajnbileon aŭ kiam mi volis pagi per mia bankkonto en Vjetnamio. Hinduĉinio (escepte de Thailando) ne estas ankoraŭ preparita por la amasa turismo, tial ne estas konstruita reto por ebligi pagon per bankkarto, kiel en Eŭropo aŭ Ameriko. En mia hotelo teorie estus akceptita mia bankkarto, sed krom la malbona ŝanĝokurzo ili volis aldoni ankoraŭ 4% administrajn kostojn, se mi pagintus per ĝi. Tial prefere mi pagis kontante en dolaroj.



Strata restoracio en Hanojo

Estis problemo por mi, ke por la longdistancaj trajno- kaj busbiletoj mi povis pagi nur per kontanta mono. Tio estis problemo, ĉar la distancoj en Azio estas pli grandaj, ol en Eŭropo. Laŭ mi la distanco inter Hanojo kaj Wuhan estas ĉ. dumil kilometroj kaj pro tio temas pri signifa vojaĝkosto. Pro sekureco mi ne kunportis tro multe da kontanta mono en mia poŝo pensante, ke en la 21-a jarcento mi sukcesos pagi per unu el miaj bankkartoj la plej grandajn fakturojn dum mia vojaĝo. En Vjetnamio mi legis en la reto, ke ankaŭ mia hotelo en Nanning akceptos nur kontantan monon.

Hieraŭ vespere mi vidis surstrate vjetnaman homon manĝantan ekzotikajn fruktojn. La grandeco de la fruktoj similis al pomo, sed ili estis tute fermitaj per strobiloj. Ili havis flavverdan koloron. La homo manĝis la fruktojn tiom bonguste, ke ankaŭ mi decidis gustumi ilin. Mi demandis la prezon, kaj oni diris 70 mil dongojn. Fine mi aĉetis en bazaro unu kilogramon kaj hejme mi konstatis ke tiuj krustopecoj similaj al skvamoj de strobilo facile forigeblis de la mola interna parto de la frukto. La internaĵo de la frukto estis vere bongusta, dolĉa kiel mielo. Sed mi ne komprenis, ke kiel povis pagi la lokaj homoj el la malaltaj lokaj salajroj 70 mil dongojn (kvar dolarojn) po kilogramo da frukto. Alia demando estas: kial estis tiom altaj la fruktoprezoj en lando, kie neniam frostomortas fruktoj kaj kie oni povus supozi ke en la konstanta varmo kaj daŭraj pluvegoj la fruktoj devus kreski eĉ sovaĝe en la arbaroj sen kultivado.



STUDENTOJ ĈE LA LAGO HOAN KIEM

En Vjetnamio teorie estas dekstra trafiko. Mi diras „teorie”, ĉar la plejmulto de la ŝoforoj laŭ tiuj principoj partoprenas en la trafiko. Sed ankaŭ sufiĉe multaj trafikas laŭ maldekstra maniero. En tiu kaosa situacio por eŭropanoj estas plej utile ne apliki strikte la lernitan regulojn de la Trafika Regularo, sed provi trafiki flekseble aplikante la ritmon de la ĉirkaŭanta trafiko. La plej malmulte da problemoj okazas en tiu kazo kaj neantaŭvidebleco estas la kaŭzo de multaj akcidentoj. Do, egale ĉu en dekstra aŭ maldekstra flanko de la ŝoseo oni veturas, la plej grave estas, ke oni veturu laŭeble samrapide por antaŭvidebligi la agadon al la ĉirkaŭantaj ŝoforoj.

Estas kutimo, ke la piedirantoj iras ĉu laŭ la maldekstra aŭ dekstra flanko de ŝosejo (vetureja parto por aŭtoj), ĉar sur la trotuaroj praktike ne eblas iradi aŭ promenadi. Tiuj estas okupitaj en la plej multaj lokoj per parkantaj bicikloj aŭ motorcikloj. Tre ofte la tie loĝantoj instaligas tien por kuiri tagmanĝon, aŭ sidante ĉirkaŭ tablo trinki tason da teo. Kaj multloke vendistoj okupas la trotuaron, ĉar tien ili metas siajn varojn surplanen.

En la kongresejo grava evento estis, ke la Akademio de Esperanto havis publikan kunsidon. Tie mi vidis kontente, ke niaj hungardevenaj akademianoj zorge plenumis gravajn taskojn en tiu signifeca internacia organizo. Koutny Ilona sidis en la ĉefa loko meze de la estraro, kaj ankaŭ Kováts Katalin esprimis sian opinion pri multaj lingvoevolujaj demandoj respondante al la demandoj de la aŭskultantoj.

Ĉar mi jam solvis ĉiujn taskojn rilate al mia pluvojaĝo, rezervis tranoktejon en Ĉinio kaj aĉetis ankaŭ busbiletan, tial mi decidis denove promeni en la urbo. Mi manĝis bongustan giroson kun vjetnama gustigo kaj poste mi iris al la bordo de lago Hoan Kiem por iom promeni. Kiam mi proksimiĝis al la lago, tiam kelkaj junaj viroj signis diskrete, ke ili vidis, ke mi ne estis usona milionulo. Tio estis sendube vero. La diskreta signado en la praktiko signifis, ke po kvaronhoro iu alvenis al mi kaj montradis per mangestoj kiom trivita

estis mia sandalo. Laŭ tiuj nekonataj junaj viroj mia sandalo devus esti gluata aŭ almenaŭ oni devus purigi ĝiajn rimenojn. Mi apenaŭ sukcesis forpeli ilin dirante, ke post kelkaj tagoj mi pluveturos kaj dume tiuj rimenoj espereble restos uzeblaj sen plia gluo. Estas mirinde, ke en tiu parto de la mondo, en Hindio kaj an Hindoĉinio multaj homoj provas kolekti monon sur stratoj per diversaj manieroj.

Ĉe la lago simila svarmado akceptis min kiel la pasintan fojon, post kelkaj minutoj juna studentino sidiĝis apud mi kun notlibro kaj skribilo en la mano. Ŝi demandis ĉu ŝi rajtis ekzerci kun mi la anglan lingvon. Mi diris al ŝi, ke tio estis bona ideo. Mi pensis, ke ĉinoj, vjetnamoj, tajlandanoj, ktp. al kutimiĝis al aliaj sonoj ol angle parolantaj eŭropanoj aŭ amerikanoj, do le plej bona maniero por evoluigi iliajn parolkapablojn estus paroli kun multaj eksterlandanoj. Tiel ili povus konatiĝi kun diversaj parolstiloj, konatiĝante samtempe kun la kulturoj de aliaj popoloj. Kaj ankaŭ mi ĝojis por havi eblecon demandi amason da aferoj pri la ĉiutaga vivo de lokaj homoj.

Mi eksciis, ke ankaŭ tiu ĉi knabino estis studento, same kiel la aliaj, kun kiuj mi konatiĝis. Ŝi vizitadis medicinan universitaton kaj nun ŝi faris la kvaran jaran studprogramon. Do ŝi ankoraŭ havis du jarojn en la universitato kaj ŝi mem devis vivteni sin, ĉar la gepatroj loĝis en eta vilaĝo. Tio signifas, ke ŝi devis pagi 450 mil dongojn monate al la universitato, sed mi tute ne komprenis, ĉu tio estis studkosto aŭ studenthejma kosto por loĝado kaj manĝoj.



Post kelkaj minutoj ankaŭ nun ĉirkaŭis nin amaseto da homoj. Studentoj kaj gejunuloj venis unu post la alia ekzerci la anglan kaj konatigi kun la kulturo de aliaj popoloj. Ili ne scis, kie estis Hungario kaj kio estis ĝia ĉefurbo, same kiel miaj kunbabilantoj antaŭ kelkaj tagoj. Sed nun ni ne parolis pri tigroj kaj leonoj. La studentoj diris, ke tiu tropika varmo ankaŭ ilin lacigis iom kaj ankaŭ mi rakontis, ke ĉe ni en Eŭropo neniam estis tiom varmege. Nun fine mi ekkomprenis, ke la klimato de Vjetnamio ne estis unueca, en Hanojo estis kvar sezonoj, sed en la sudo estis nur du, plua kaj suna sezonoj.

La studentoj rakontis, ke ili kutime festis la Tet novjaron kaj ni parolis ankaŭ pri manĝoj, kiujn oni kutimis manĝi tiam. Mi spertis en Vjetnamio, ke oni preferis la grasan porkoviandon, malkiel la skandinavoj kiuj eĉ ne volis vidi tion. La medicina studentino tre ekĝojis, kiam alvenis ankaŭ alia studentino, kiu vizitis la saman universitaton. Ŝi studadis ne la ĝeneralan kuracadon, sed frekventis sanitaran fakon. Tiu knabino parolis angle multe pli flue ol la alia. Tiel mi pli facile komprenis, ke post la finstudoj ili ambaŭ ŝatus studi plu en iu eŭropa universitato por fari la fakajn ekzamenojn en eŭropaj universitatoj.

Ili demandis min pri la lingvoj kiujn la studentoj ĉe ni lernis. Ili ne tute komprenis, kiam mi diris, ke post la dua mondmilito ĉe ni en Hungario studentoj devis lerni la rusan lingvon. Plurfoje mi devis rakonti, ke post la milito restis rusaj soldatoj en Hungario kaj ankaŭ en aliaj landoj de Orienta Eŭropo. En tiu politika situacio rusa lingvo estis la deviga studobjektoj en la plej multaj landoj de la regiono. Tiel jam ankaŭ ili ekkomprenis la situacion kaj rakontis, ke ankaŭ ili militis iam kontraŭ Ĉinio kaj kiam la ĉinoj venkis ankaŭ ili devis lerni la ĉinan. Tiel ni konkludis, ke laŭ tiu vidpunkto la mondo simile funkciis en Eŭropo kaj Azio.

La plej interesan klaĉon pri tiu temo mi aŭdis en Pollando en la turniĝo de sepdekaj-okdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Tiam generalo Jaruzelski transprenis la regadon de la lando. Li deklaris militan staton en la lando kaj enkarcerigis la prezidanton de movado Solidareco, la postan ŝtatprezidanton. En tiuj cirkonstancoj konferenco de UNO estis organizita en pola urbo Gransk, kiun ankaŭ

mi partoprenis. Tiam tuta Pollando timis, ke Sovetio envolviĝos ankaŭ per armeo. La partoprenantaj studentoj post kelkaj kruĉoj da biero fortigite per rumo komencis kanti mok-kanton memfaritan kun proksismume jena teksto:

„Pollando havas multajn amikojn kaj unu el ili estas ege granda. Sed foje okazis, ke ankaŭ tiu granda lando havis malfacilaĵojn. Ilia problemo estis, ke ili militis kontraŭ siaj najbaroj, kiuj ordonis, ke ili manĝu rizon per bastonetoj kaj instruu la ĉinan lingvon en la lernejoj.

Sed la civitanoj de tiu granda lando povis fari tion tre malfacile, ĉar manĝi rizon per bastonetoj estis tro laciga por ili kaj ankaŭ la ĉina skribosistemo estis tro komplika.

Tial ili petis helpon de la amika pola popolo. La poloj kunsidis por diskuti la situacion. Tiam pola proverbo venis en ilian kapon. Laŭ tiu proverbo la plej bona amiko montras sin en la plej granda bezono. Tial do ili ekiris kaj helpis la grandegan najbaron en la granda malfacilaĵo.

La grandega popolo tre ekĝojis pro la helpo, ĉar kune ili venkis. Feliĉe ekde tiam ili ne plu devis manĝi rizon per bastonetoj kaj ne plu estis devo la lernado de la ĉina lingvo en la lernejoj. Ĉar lerni la polan lingvon estis tute sufiĉe por ili.”

Post nia agrabla babilo kun la studentoj la plej multaj studentoj disiris, ni restis nur trio sur la benko ĉe la riverbordo. Mi kaj la du studentinoj. La knabinoj proponis promeni ĉirkaŭ la lago. En angulo de la lago iu metis muzikilon sur la bordon kaj 8-10 homoj dancis ĉirkaŭ la muzikilo. Aliloke sportiloj estis ĉe la bordo kaj homoj faris gimnastikon kaj muskolekzercojn. En eta insulo de la lago mezepoka preĝejo estis konstruita. Tion eblis atingi tra svelta ponto, nomita „*Matena sunlumo*”, kiel la knabinoj diris al mi. Antaŭ kelkaj tagoj mi vidis grandegan statuon proksime al tiu ponto, ĝi estis vjetnama reĝo Ly Thai To, rekonita kiel nacia heroo. Mi eksciis multajn interesajn aferojn, la vespero pasis agrable kaj post sunsubiro ankaŭ la lago estis bele lumigita. Tial laŭ mi la lago Hoam Kiem aspektis multe pli bela nokte, ol nia Urboparka lago en Budapeŝto.